


人民中國報道

El Populo Cínico

Jan. 1952

1



AL NOVA VENKO

—Ĉefartikolo de la Pekina “Popola Tagĵurnalo” je la 1-a de januaro—

La ĉina popolo trapasis en venko la jaron 1951 kaj marŝas en la jaron 1952.

La jaro 1952 havas por ni pli grandan signifon, ĉar en tiu ĉi jaro ni plenumos la ĉefajn preparajn laborojn de la grandskala ekonomia konstruado en nia lando; ni akiros por ni pli grandan venkon en la batalado kontraŭusona kaj porkoreia; ni pliigos la forton de nia nacidefendo; ni ekstermos en la tuta lando la restantan forton de imperiismo, feŭdalismo kaj burokrata kapitalismo; kaj ni disvolvos la movadon de pli-produkto kaj ŝparo por ĝenerale realtigi la produktadon al la plej alta nivelo antaŭ la liberiĝo, kaj eĉ super tiun nivelon en multaj produktaj fakoj.

En la batalado kontraŭusona kaj porkoreia ni jam gajnis grandan venkon dum la pasintaj 14 monatoj. La ĉinaj popolaj volontuloj, kune kun la Korea Popola Armeo, ekstermis dum la pasintaj 14 monatoj pli ol 490,000 malamikojn inkluzive pli ol 210,000 Usonajn soldatojn. La heroaj trupoj de la ĉina kaj korea popoloj jam pelis la agresantojn al la proksimo de latitudo 38 kaj konigis al la malamikoj la plipotentigon de niaj ter- kaj aer-armeoj ke ili ne povis ne konsenti intertraktaton pri armistico. Kvankam la malamikoj ankoraŭ prokrastadas la intertraktaton, tamen tio montras nur la internajn konflikton kaj embarason de la malamikoj, sed ne ilian konvinkon pri la estonto de la milito. Koreio kaj Ĉinio daŭre klopodos por la sukceso de la intertraktato, kiu nun dependas de la sinteno de la Usona Registaro. En la malfermo de la tria kunsido de la unua Landa Komitato de la Popola Politika Konsiliĝa Konferenco Prezidanto Maŭ Ze-tung diris: “Antaŭ longe ni diris ke la korea problemo devas esti solvata per paca rimedo. Nun ni ankoraŭ tiel opinias. Se nur la Usona Registaro volas solvi la problemon sur justa kaj racia bazo, kaj ne plu uzos ĉiun eblan senhontan rimedon por subfosi kaj prokrasti la intertraktaton kiel en la pasinteco, sukceso en la korea armistica intertraktato estas ebla; alie ĝi estas neebla.” Nun la stato ankoraŭ restas tia. Se rezultiĝos sukceso el la armistica intertraktato, Koreio kaj Ĉinio plie klopodos por la paca solvo de la korea kaj aliaj orientaj problemoj; se rezultiĝos malsukceso el la armistica intertraktato, Koreio kaj Ĉinio fiaskigos la malamikojn pli peze kaj severe.

Nun ankoraŭ daŭras la granda batalo kontraŭusona kaj porkoreia, kies triumfon akiri devas esti la ĉefa celo de ĉiaj penoj de la tutlanda popolo. La fakto pruvis en la pasintaj 14 monatoj, ke kontraŭbatali Usonon kaj helpi Koreion ne nur estas la celo, sed ankaŭ la movforto de ĉiuj niaj laboroj. Kontraŭe de la supozo de niaj malamikoj, tiu ĉi batalo ne prokrastas

sed plirapidigas la irador ĉe la konstruado kaj la preparaj laboroj de la konstruado en nia lando. Pro tio, en la jaro 1952, ni havas plenan konvinkon unuflanke peni por pli granda venko en la batalado kontraŭusona kaj porkoreia (inkluzive la venkon de paca solvo), kaj aliflanke peni plenumi la ĉefajn preparajn laborojn de la grandskala ekonomia konstruado.

Pri la grandskala ekonomia konstruado, la ĉina popolo jam entreprenis multe da gravaj preparaj laboroj en la jaroj 1950 kaj 1951. Ni efektivigis senprecedencan unuecon en la lando, fondis popoldemokratian reĝimon de ĉiuj rangoj, kaj starigis amikajn rilatojn kun Sovetunio kaj la popoldemokratiaj landoj. Ni stabiligis la financon kaj reguligis la moncirkuladon, refunkciigis la trafikon kaj komercon enlandan kaj internacian, kaj komencis disvolvi la kooperadon. Ni komencis reirigi la produktadon en industrio kaj agrikulturo, reformi la administradon de ŝtataj entreprenoj, kaj ordigi la industrion kaj komercon. Ni ekstermis pli ol 2 milionojn da banditoj kaj bonefike subpremis la agadon de diversaj kontraŭrevoluciuloj. Ni stabiligis la financon kaj reguligis la moncirkuligitaj regionoj loĝataj de pli ol 150 milionoj da kamparanoj. Ni reirigis la kulturan kaj edukadan laborojn kaj faris en ili unuapaŝajn disvolvonojn kaj reformojn. Ni disvolvis la unuecfroton en diversaj socitavoloj, demokrataj partioj kaj nacioj. Ni disvolvis la organizadon de laborista, junula kaj aliaj amasoj. Ni disvolvis la organizon de la Ĉina Komunista Partio kaj komencis ĝin ordigi kaj fortikigi. Ĉio ĉi tio servas la ekonomian konstruadon, t.e. la industriigon de nia lando. Sed ni ankoraŭ ne tute plenumis ĝiajn preparajn laborojn; ni devas ilin plenumi en la plej ĉefaj flankoj en la jaro 1952.

En la jaro 1952 ni devas plifortigi nian nacidefendon per tre granda peno. La invado de Usonaj imperiistoj al Tajvan kaj Koreio pruvis, ke ni ne povas defendi nin mem se ni ne havas modernan kaj fortan nacidefendon, kaj ke neniĝos ĉiuj niaj konstruaĵoj se la malamikoj ilin bombardos. Tial ni devas daŭrigi la plifortigadon de la nacidefendo, kiun ni jam komencis en la jaro 1951, kaj konstrui niajn modernajn ter-, aer- kaj mar-armeojn. La nacidefendo devas esti la centro de ĉiuj niaj laboroj en la konstruado. Ni devas plene disvolvi la popolan milicon, por krei kondiĉojn por la efektivo de konskripcia sistemo.

En la jaro 1952 ni devas plue ekstermi la restantan forton de imperiismo, feŭdalismo kaj burokrata kapitalismo. Tio estas, escepte parton da regionoj loĝataj de minoritatoj, ni devas en la kuranta jaro efektivigi la agraran reformon en la tuta lando, kaj serioze kaj

bone fini la laborojn pri la agrara reformo en la regionoj kie la agrara reformo estis jam efektivigita en la jaro 1951. Tio estas, ni devas en la kuranta jaro plene efektivi la demokratian reformon kontraŭ feŭdalismo en urboj kaj en ŝtataj kaj privataj entreprenoj fabrikaj, minejaj, trafikaj, k.a.. Tio estas, ni devas en la kuranta jaro daŭrigi la bataladon subpremi kontraŭrevoluciojn ke ĉie, kien penetris ne profunde tiu batalo kaj kie tiu batalo ankoraŭ ne tuŝis, la problemoj povu esti radikale solvitaj, kaj ke ĉie kien pli profunde penetris tiu batalo, disvastiĝu konstanta gardo kontraŭ malbonuloj.

En la jaro 1952 ni devas ĝeneraligi la movadon de pliprodukto kaj ŝparo sur la bazo de efektiviĝo de la agrara reformo en la tutlanda kamparo kaj la demokrata reformo en la entreprenoj fabrikaj, minejaj kaj trafikaj. Pro la penado de la tutlandaj laboristoj kaj kamparanoj en 1951, la produkta kvanto de parto de la industriaj produktaĵoj (ekz. kupro, sodo, kaŭĉukaj radoj, papero, ŝtofo, ŝtalmaterialoj, cemento) kaj agrikulturaj produktaĵoj (ekz. lino, kotono, bakita tabako) jam superis la rekordan kvanton en la historio de nia lando, sed la aliaj ankoraŭ ne atingis la antaŭan rekordon. En la jaro 1952 ni devas per la movado de pliprodukto kaj ŝparo realigi la produktadon en industrio kaj agrikulturo al la plej alta nivelo antaŭ la liberiĝo, kaj eĉ super kaj multe super tiun nivelon en multaj produktaj fakoj.

Flanke de la agrikulturo, ni devas pli laŭplane organizi la kamparanojn en la organizaĵojn de laborinterhelpado, produkta kaj proviza-venda kooperado, kaj pli laŭplane rekomendi al la kamparanoj novajn agrikulturajn teknikojn kaj novspecajn semojn, por altigi la produktan kvanton en ĉiu arenuo kaj konduki la kamparanojn al unuapaŝa kolektiva mas-trumado. Por doni ekzemplon al la kamparanoj kaj por ke la ŝtato rekte posedu parton da gravaj agrikulturaj produktaĵoj, ni devas multe disvolvi la ŝtatfarmajn laborojn en la jaro 1952 klopodante fondi kaj bone administri ŝtatfarmojn en ĉiu provinco, ĉiu distrikto, ĉiu gubernio kaj eĉ ĉiu gubernia subdistrikto (kondiĉe ke tie estas sufiĉa tero). En ĉiuj grandaj administraj regionoj, provincoj kaj distriktoj devas esti establitaj ŝtataj fabrikoj aŭ riparejoj de agrikulturaj instrumentoj por provizi la kamparanojn per novtipaj agrikulturaj instrumentoj.

Flanke de la industrio, ni devas diskonigi la spertojn de la Nordoriento kiu kreis per pliprodukto kaj ŝparo en 1951 riĉaĵon egalan al 13 milionaj tunoj da greno, kaj disvolvi la laboristan amasmovadon kontrakti produktajn planojn kaj efektivi la pliprodukton kaj ŝparon en ĉiuj lokoj, industriaj fakoj, fabrikoj, minejoj kaj laborejoj tra la tuta lando, por pliutiligi la latentan forton de la nun ekzistantaj instalaĵoj por-produktaj, plibonigi la teknikon, plimultigi la produktan kvanton, plialtigi la produktan kvaliton, plimalgrandigi la produktokoston, plireguligi la administradon de kapitalo kaj produkto kaj elimini malŝparon en fundamenta konstruado. Per nia penado en la jaro

1952 ni devas ne nur akumuli sufiĉan sumon da kapitalo por la bezono de la lando en la estonta evoluigo de industrio, sed ankaŭ havigi al la entreprenaj administrantoj pli multe da spertoj sen kiuj la industriigo de nia lando estas neebla.

La malamikegoj de pliprodukto kaj ŝparo estas korupta alproprigo, malŝparo kaj burokratismo. Sekve la nuntempa batalado kontraŭ korupta alproprigo, malŝparo kaj burokratismo havas decidan signifon por la efektiviĝo de nia pliprodukta kaj ŝpara plano en 1952. Ni devas serioze mobilizi la popolamasojn por ĝisfine antaŭenpuŝi tiun batalon ke ĝi penetru en ĉiun institucion, ĉiun fabrikon, ĉiun straton kaj ĉiun vilaĝon, ke la nepardoneblaj korupta alproprigo, malŝparo kaj burokratismo ne eblos okazi plu.

Por prepari la ekonomian konstruadon ni devas pretigi laborontojn. Pro tio en la jaro 1952 ni devas reformi la edukon sistemon kaj plimultigi mezajn kaj altajn lernejojn por komenci grandskale kulturilaborontojn bezonotajn en la ekonomia konstruado; ni devas disvolvi inter la intelektuloj la movadon de ideologia remuldo por ke la nunaj kaj estontaj intelektuloj povu fidele servi la popolon.

La remuldo de ideologio estas necesa ne nur por la intelektuloj, sed ankaŭ por la diversaj socitavoloj de nia lando. La tutlandaj popolanoj devas kompreni la hodiaŭon kaj morgaŭon de nia nacio kaj sian pozicion en la lando, kompreni kio estas farenda kaj kio nefarenda kaj kio estas farinda kaj kio nefarinda, kaj sekve remuldi sian eraran ideologion kiu ne utilas al la popolo kaj sekve ankaŭ ne utilas al ili mem. La disvolvo de la movado de ideologia remuldo certe senprecedence plifortikigos la popoldemokratian unuecfronton en Ĉinio.

La granda Ĉina Komunista Partio estas la gvidanto de nia granda patrio. En la batalhistorio de pli ol 30 jaroj, precipe en la batalhistorio de la pasintaj du jaroj, la Ĉina Komunista Partio jam akiris altan konfidon de la tutlanda popolo. Sed la membroj de la Ĉina Komunista Partio same devas konstante lerni kaj remuldi sian ideologion. De la aŭtuno de 1951 la Ĉina Komunista Partio jam komencis la ordigon de siaj bazaj organizoj, kiu en la jaro 1952 komplete disvastiĝos. La batalo kontraŭ korupta alproprigo, malŝparo kaj burokratismo pliriĉigis la enhavon de la ordigo en la Ĉina Komunista Partio. Ĉiu membro de la Ĉina Komunista Partio devas likvidi la burĝan kaj etburĝan influon en sia ideologio kaj pene lerni marksismon-leninismen kaj la teoriojn de Maŭ Ze-tung kunligantajn marksismon-leninismen kaj la praktikon de la ĉina revolucio. Nur tiel ĝi povas ĝuste gvidi la ĉinan popolon efektivi novajn historiajn taskojn.

Niaj taskoj en 1952 estas malfacilaj, kaj ankaŭ tre grandaj kaj gloraj. Ni ĉiuj unuiĝu sub la gvido de la Ĉina Komunista Partio kaj Prezidanto Maŭ Ze-tung kaj kun firma konvinko kaj forta volo marŝu al novaj venkoj!

LA USONAJ MORTIGISTOJ

—*Jene estas denunco kontraŭ la sanga krimo de la Usona invada armeo, verkita de kaptita batalanto Kim Zun-ken de la Korea Popola Armeo, kiu forkuris el "rifugejo de kaptitoj" de la Usona Armeo.*—

En la batalo ĉe Liencen kaj Kaisung, mi kaj aliaj kvin kamaradoj falis pro vundo en la manojn de Usonaj agresantoj, kaj estis eskortataj de du Usonaj mortigistoj al la t.n. "rifugejo de kaptitoj" ĉe Ĉuĉan. Survoje iu kamarado ne povis plu iri pro severa vundo kaj tiam Usona mortigisto mortigis lin kaj ĵetis lian korpon flanken.

Dum la irado al Izengbu, ni nenion manĝis kaj pro malsato kaj dolorego de vundo ni ne povis iri rapide, sed la mortigistoj batadis nin per pafiltenilo por nin rapidigi.

Pluirinte pli ol 15 liojn de Izengbu, ni renkontis ĉirkaŭ unu roton da Usonaj agresantoj. Tiuj kanajloj nin haltigis, ĉirkaŭis kaj rigardante nian vundon ridaĉis freneze. Kelkaj el ili eĉ pugnobatis aŭ pied-frapis nin.

Iu kanajlo, verŝajne oficiro, starante antaŭ ni, ordonis nin malfermi la buŝon, sed ni indigne rigardis lin ignorante. La bestoj furioziĝis, iu volis disbati nian buŝon per bastono, kaj alia kraĉadis en nian vizaĝon. Fine, dum la insultado de la bestoj ni malfermis nian buŝon—ne por ilin obei, sed blasfemi.

La mortigistoj tiam pli koleraĉis kiel sovaĝaj bestoj, blekis antaŭ ni: "Hm! tio estas ankoraŭ tro milda; la koreoj estas sovaĝuloj, ne povas esti alie traktataj..." Ni tutkorpe sangis pro la torturado. La mortigistoj vidante ke ni ankoraŭ ŝtaris heroe, fortrenis du kamaradojn el ni kiel celtabulon por ekzerci pafadon!

Tiel turmentate ni iradis ses tagojn kaj fine atingis Ĉuĉan.

La rifugejo de Ĉuĉan estas ne rifugejo sed ja buĉejo! Ĝi estis kvarfoje ĉirkaŭata de elektrobariloj kaj ĉie hundoj. Ni estis enĵetitaj en la "specialan malliberejon" senluman kie naŭza odoro de putranta kadavro incitadis nian flarsenton.

La sekvintan matenon, ni estis eltrenataj por esti "juĝataj". Iu barbara "juĝisto" kun kruda mieno demandis: "Diru, kiom da usonanoj vi mortigis?" Poste la kanajlo malfermegis la lupajn okulojn kaj svingis la harplenan manon dirante: "Ĉiuj komunistoj devas esti mortigitaj!"

Kun leda rimeno en la mano li kondukis nin en alian ĉambron, kie ni suferis ĉiajn torturojn. Nin pendiginte, ili jen nin vipadis jen nin demandis ĝis kiam ni svenis. Sed ni ĉiam alrigardis ilin indigne kaj nenion diris. La skurĝo de la mortigistoj nin frapadis. La haŭto kaj karno de la kamaradoj disŝiriĝis kaj sango gutadis.

Iu kamarado ĝemis pro dolorego. La mortigisto diris: "Bone, estas la tempo!" kaj li tiris la kamaradon sur feran tabulon, perforte malfermis lian buŝon, en-

verŝis gasolenon kaj ekbruligis. Fajro ekflamis el la buŝo de la kamarado kaj tuj disvastiĝis tutkorpen; fine li estis brulmortigita.

Tia senprecedence kaj senkompare kruelega torturo estas ĉiutagaĵo de la mortigistoj.

Intencante nin turmenti ĝismorte, la mortigistoj daŭre nin torturis pli kruele.

La mortigistoj malpermesis nin eĉ moveti en la malliberejo; se iu movetis, li tuj ricevis baton. Foje ĉar iu kamarado nur movetis, ni tuj estis elkondukataj kaj enmetataj en "specialan malliberejon" kun sango-makulitaj muroj. En ĝi brediĝis sennombre da moskitoj. Tuj kiam ni estis enmetitaj en la ĉambron, la moskitoj amasege sieĝis nin kaj suĉis nian sangon. Pro netolerebla dolorego ni svenis kaj du kamaradoj el ni mortis pro tio.

En la "rifugejo" troviĝas ankaŭ "vapora malliberejo." Tio estas ligna kestego, en kiun varmega vaporo estas enkondukata. Homon oni enmetas en ĝin, kaj poste la kuirita korpo estas donata al hundoj kiel nutraĵo.

Esepte min, ĉiuj kamaradoj estas mortigitaj per ĉiaspecaj torturoj de la sovaĝaj bestoj.

Iun tagon, la malamiko trenis min al loko, kie "kuracisto oficiro" ekzamenis min. Sur mian frunton li stampis "S", kaj skribaĉinte sur papero li ĝin donis al du aliaj gardistoj, kaj ĉi tiuj min kondukis al "rifugejo de ruĝa bandito". Tie mi trovis kelke da samlandanoj el nia nordo, kiujn la mortigistoj nomis "rifugantoj".

La mortigistoj metis min kun la samlandanoj en aŭtomobilon kaj transsendis suden.

Survoje ni bonŝance renkontis nian Gerilon de Ĉijisan-Monto, kiu venis por ataki la aŭtomobilon. Vidante la gerilanojn alvenantaj la malamikoj tuj alpafis nin per maŝinpafilo. Ĉar ni estis kunligitaj je la membroj, la plejparto estis mortigitaj.

La gerilaj kamaradoj mortigis la du eskortantojn kaj savis nin, ses personojn ankoraŭ hazarde vivantajn.

Poste ni sciis, ke la malamikoj intencis sendi nin al la mikrobo-laboratorio kiel eksperimentan materialon.

En la "rifugejoj" ankoraŭ restas mil samlandanoj, kiuj probable baldaŭ estos mortigataj aŭ forsendataj al mikrobo-laboratorio.

Mi denuncas la Usonajn bestojn kiuj torturadas kaj buĉadas la kaptitojn!

trad. Nash

GRANDA AMO

Hu Ŝiaŭ-Ju

Ĉi tiujn tagojn mi estas daŭre agitata de tiuj okazajoj kaj kun plezuro mi pensadas pri ili de tempo al tempo. Ilin ekmemorinte mi ne povas ne rakonti al kamaradoj gestante per la manoj kaj piedoj. Ĉiufoje la rakonto estis aŭskultata de ĉiuj kun ĝojo. La okazaĵojn eble oni konsideras banalaj, tamen tra ili mi vidas pli klare, kiel arde la vastaj popolamasoj amas nian patrion.

Iun tagon en la lasta tagodeko de junio mi veturis okcidenten kun alia kamarado per milita aŭto al Ĉangvu. La numeron de la aŭto mi jam forgesis, sed mi ankoraŭ memoras ke ĝi estis dekrada kaj ŝarĝita per ŝuoj por batalantoj. La konduktoroj estis ŝoforo iam servinta en Kuomintang armeo (pri tio mi informiĝis dum interparolo kun la ŝoforohelpanto) kaj ŝoforohelpanto en militista uniformo. Jen estas mia rakonto pri ĉi tiu helpanto:

Li estis deknaujara kaj fortika Seĉuan-ano, nomata Vang Ŝjue-min. Lia vesto estis olemakulita kaj kroĉe ŝirita kelkloke. Sur liaj manoj estis sangaj cikatroj. Ŝajnis ke la manojn vundis ia feraĵo.

Kamarado Vang Ŝjue-min estis homo tre optimisma kaj havis grandan esperon pri la bela estonteco de la patrio. Tiu espero inspiris lin kaj igis lin ĉiam ĝoja.

Ni jam vidis multfoje: Tuj post kiam haltis la aŭto, la ŝoforo en civila vesto, viŝante ŝviton kaj svingante ventumilon, kuris sub arbon apud la vojo por ĝui malvarmeton tie, grumblante: "Ho, terure varmege!"

Kaj tiam Vang Ŝjue-min, la aminda helpanto, pli okupiĝas. La suno brulas kiel fajro, sed lia koro ardas eĉ pli ol fajro. Li enverŝis akvon kaj gasolenon al la motoro kaj kontrolas per piedbatoj ĉu aero mankas al la radringoj. Jen li kuŝas surdorse sub la aŭto ekzamenante tion kaj palpante ĉi tion; jen li enrampas la aŭton por zorge kontroli ĉu la kanabaj sakoj plenaj de militistaj ŝuoj ie truiĝis pro frotado; jen li per tuko viŝas la motoran kovrilon kun granda zorgemo—li ĝin jen viŝis jen karesis kiel patrino sian infanon. La suno brulis kiel pelvo da fajro. Ĉiuj fuĝis al loko ombrita kaj mal-

varmeta. Nur li kvazaŭ neniom sentis ke li estas en somera sunbrulo.

"Kamarado, ripozu kaj ĝuu malvarmeton por iom da tempo," mi komencis lin alparoli kun amsento. Ridetante li al paŝis kaj sidiĝis inter ni. Forviŝante sian ŝviton kaj koncentrigante sian tutan atenton sur la aŭto li alparolis nin entuziasme: "Tia objekto estas tre kara al la patrio. Se ni bone prizorgas ĝin, ĝi uzeblus kelkajn jarojn pli longe kaj per la ŝparitaĵo oni povas aĉeti aeroplanojn kaj kanonojn kaj ilin doni al la volontuloj por ekstermi pli da Usonaj diabloj, kiel bone!"

Kiam la aŭto venis al Ĉangvutingkoŭ-deklivo, subite la ĉielo plene kovriĝis de nigraj nuboj kaj ekpluvegis torente. Li rapideme kovris la aŭton kaj ordigis ĉion kio devis esti ordigita kvazaŭ li ne volis ke eĉ bagatelaĵo kiel kudrilo aŭ fadeno de la patrio difektiĝu pro malzorgo."

Ni devis veturi ankoraŭ unu lion (duonkilometro) kaj poste ekpiedi laŭ vojeto al nia celloko. Tamen por eviti ĝenon al la ŝoforo, ni adiaŭis ilin je tiu halto. La aŭto kuregis for. Ni iris sur la kota vojo. Tiam de malproksime okcidenten alveturis pasaĝera aŭto kaj subite ĝi haltis antaŭ ni. La ŝoforo ĉu laborista bluzo mansignis al ni: "Enaŭtiĝu, kamaradoj, tro kota la vojo estas."

"Dankon, sed baldaŭ ni devos ekiri laŭ vojeto."

Post kiam ni klarigis kaj dankis ilian bonvolon, pasaĝeroj en la aŭto preskaŭ samtempe konkure eligis tri pajlĉapelojn tra la fenestroj kaj insistis ke ni ilin surmetu. Ni ne povis rifuzi. Ni akceptis unu ĉapelon. Ni ankoraŭ ne dankis ilin, kiam la aŭto jam forveturis kun zumado.

Tiam boliĝis mia emocio. Mi pensis: Kiel arda, sincera kaj simpla estas la amo de la popolo al ni. Tion kaŭzas la fakto ke ni estas popola armeo, armeo defendanta la patrion kaj la venkon de la popolo. Tion pensante mi ne povas ne rememori, ke en la armeo mi vidis multe da batalantoj ŝtele ellitiĝis meznokte por ekzerci ŝetadon de grenado sur ekzercejo. Ili sin skzercis tiel diligente kaj pene ke ili persistis eĉ

kiam iliaj manoj ŝveliĝis. Iufoje mi demandis al iu batalanto: "Kamarado, ĉu vi ne sentas doloron? Eĉ viaj brakoj ŝveliĝis." Li diris senkaŝe: "Kial ne! Tamen, kamarado, tio ja estas multe pli bona ol ke la tuta popolo suferu katastrofon. Ĉu la korea popolo ne estas suferanta de la Usona imperiismo?! Ni neniam povas lasi tiujn brutajn perforti en nia lando." Tion dirante li alten levis grenadmodelon kaj diris: "Ĉu ne tion ĉi la malamikoj plej timas? Por la eterna feliĉo de la patrio, pensu kion povas signifi iom da doloro!"

Mi daŭre iris kun mia kamarado en pluvo. Antaŭ niaj okuloj aperis kruta deklivo. Pluvigis pli kaj pli dense. La vojo estis falige glita. Kion fari? Fine ni haltis antaŭ kaduka templo kaj intencis atendi iom da tempo kaj denove ekiri poste kiam la pluvo malfortiĝos. Tiam renkonte al ni iris juna lernanto. Lia staturado estis tre malgranda. Ŝajnis ke li estis maksimume 11-12-jara. Liaj okuloj estis grandaj. Sur lia vizaĝo vidiĝis rideto. Kun pantalon-tuboj duonrulitaj kaj piedoj nudaj li iris tiel rapidmove kaj vigle. Vidante nin li unue salutis per leviĝo de mano kaj tuj poste demandis kun entuziasmo kien ni iras. Sciinte ke ni volas malsupreniri la deklivon, li tiris nin per siaj manetoj al sia domo kaj diris dum irado: "Ne iru plu, alie vi glitus en la ravinon!"

Li estis nomata Ĉang Ŝiaŭ-kuej. Lia patro aliĝis al la volontuloj antaŭ la mult-afera sezono de agrikulturo. Hejme restis nur li kaj lia panjo. Lia patrino kapablis labori kaj ili vivis tre bone.

Atinginte la domon, li unue laŭte alparolis sian patrion ke ŝi preparu manĝaĵon.

En la ĉambro, meze de la kontraŭporda muro, pendis la portreto de Prezidanto Maŭ. Ŝiaŭ-kuej levis sian kapon kaj rigardis la portreton, kaj poste sinturnante al ni li diris: "Estas panjo kiu sendis min aĉeti la portreton. Mia panjo diris: Prezidanto Maŭ estas la savanto de ni malriĉuloj." Tiam li elprenis kajereton el sub sia basko. Lia vesto

(daŭrigo sur p. 7)

Ĉina Laboristaro en la Kampanjo Kontraŭbatali Usonon Kaj Helpi Koreion

— Lej Ping —

En la lasta jaro, sur la Korea fronto kaj en ĉiu fabriko kaj minejo de Ĉinio, la ĉinaj laboristoj kontribuis senkomparan forton al la kampanjo kontraŭbatali Usonon kaj helpi Koreion. Jam en la komenco de la movado multaj laboristoj volontuliĝis kaj marŝis al Koreio por rezisti la Usonajn agresantojn. La elektro-segisto Ĉeng En-ŝi de la urbo Jingkoŭ, en nokta atako al Iceng-Monto ĉe la suda bordo de Han-riero, sin ofereme prenis de la malamnikoj 4 maŝinpafilajn poziciojn, akiris 4 pezajn kaj malpezajn maŝinpafilojn, 1 bazukon, 1 aŭtomatan pafilon kaj 1 karabenon. Li fariĝis superega meritulo de iu trupo de la Ĉinaj Popolaj Volontuloj. Sur la trafikaj linioj de Koreio la bravaj ĉinaj fervojistoj kaj ŝoforoj venke batalas kontraŭ la bombado kaj pafado de la malamikaj aeroplanoj kaj garantias la provizon al la frontaj trupoj. Ili disrompis la 3 futojn dikan glacian tavolon sur la rivero Buliukang, ensaltis en la akvon kaj urĝe riparis la riveran ponton. La tempo-bombojn, kiujn malsupren eljetis la malamikaj aeroplanoj, ili forportis de sur la fervoja linio per ambaŭ manoj. La senmorta heroo fervojisto Vang King-ĉoŭ eĉ oferis sian korpon ŝtopi en la radon por elsavi la kurantan vagonaron plenigitan per armiloj kaj municio. Ĉio ĉi brilaj okazintaĵoj stimulis la tutlandan popolon pli brave persisti en la firma batalado kontraŭ la Usona imperiismo.

Sur la produkta batalfronto de la patrio, sonas tra ĉiuj fabrikoj kaj minejoj la sloganoj "La fabriko estas nia fronto kaj la martelo—nia armilo!" "Ju pli da karbo, des pli da forto por kontraŭbatali Usonon kaj helpi Koreion!" Pli ol 2,230,000 laboristoj tra la tuta lando partoprenis la patriotan laborkonkurson kaj jam pli ol 19,000 laborgrupoj respondis la defion de la grupo de Ma Heng-ĉang. La Nordorienta laboristaro respondis la alvokon de kamarado Kaŭ Kang por pliprodukto kaj ŝparo, kaj ili jam pliproduktis kaj ŝparis pli ol 10,000,000 tunojn da greno por la patrio per altigo de la kvalito de la produktaĵoj, malpliigo de la produktokosto, ekspluatado de kaŝita energio de industrio kaj disvastigo de progresaj spertoj. La valoro, kiun la la Nordorientaj laboristoj laŭplane pliproduktis kaj ŝparis, estas sufiĉa por aĉeti pli ol 4,300 batalaeroplanojn (tri kvaronojn pli multe ol la aeroplanoj kontribuitaj de la tutlanda popolo dum duonjaro). Preskaŭ ĉiuj funkciuloj kaj laboristoj de la ŝtataj kaj publikaj entreprenoj en Tienzino partoprenis la patriotan laborkonkurson, kaj stimulate de la patriota pasio la Tienzina Akvokonduka Kompanio kreis 15 novajn rekordojn en aŭgusto, 1951, kaj mallevi la produktokoston je okono de la antaŭe planita kosto. La ŝpinistino Ho Kien-ŝiu en Cingtaŭ kreis sciencan labormetodon, kiu nun estas praktikata en multaj ŝpinejoj. Se ĉiuj ŝpinistoj atingos la labornivelon de Ho Kien-ŝiu, ili povos pliprodukti 40,000 pakojn da ŝpinaĵoj ĉiujare por la ŝtato, kaj tio sufiĉos por elteksi ŝtofon sufiĉe longan por volvi la terglobon pli ol unu fojon. La laboristo Li Kjun-ting en Kiavang-Karbominejo kreis novan rekordon minekspluati 258 tunojn da karbo per pneŭmatika pioĉo en ĉiutaga laborhoraro. Tiu rekordo jam superis la duan rekor-

don de Stahanov de Sovetunio. 258 tunoj da karbo estas plene sufiĉaj por la konsumado dum 70 jaroj de familio, kiu bezonas po 10 kilogramoj da karbo ĉiutage. Helpe de ĉi tiuj ciferoj oni povas scii kiel grandan forton la ĉina laborista klaso jam kontribuis por kontraŭbatali Usonon, helpi Koreion kaj konstruadi la patrion!

Usona imperiismo iam fantaziis strangoli la junan industrion de nia patrio per blokado kaj malpermeso de importado al Ĉinio. Sed tiun ĉi malican planon de la Usona imperiismo frakasis la ĉina laborista klaso, gvidante la tutlandan popolon en la multoble rapidigita konstruado. Ekde la pasinta jaro multaj industriaĵoj, kiaj antaŭe estis importitaj, portas nun la markon "Fabrikita en Ĉinio". La laboristoj senĉese liveradas fierindajn kaj ĝojigajn informojn al la samlandanoj: ĉijare ni jam povas fabrikati kompletan ŝpinmaŝinon; ni mem fabrikis aŭtomobilon; ni mem fabrikis traktoron; niaj maŝinistoj jam kreis pli ol 270 specojn da novaj produktaĵoj antaŭ junio de 1951 kaj la Ĉengtu-Ĉungking-fervojon, pri kiu la reakciuloj nur planadis kaj babilis dum 40 jaroj, ni finkonstruos en ĉi jaro kaj 284 kilometroj de ĝi jam komencis funkcii en 1951. Ni estas plene konvinkitaj ke ni povas venki la imperiismojn kaj konduki nian patrion al industriigo.

La ĉina laboristaro gajnis venkon sur la produkta fronto, kaj en ĉiu patriota politika movado ili marŝas unuavice de la tuta popolo. 75% de la funkciuloj kaj laboristoj de la tutlandaj fervojoj sin registris por volontule helpi Koreion, kaj 80% de la fervojistoj irintaj en Koreion faris meritaĵojn por la popolo. La Sanhajaj laboristoj kontribuis 50 batalaeroplanojn al la volontuloj. 85% de la tutlandaj poŝtistoj kaj telegrafistoj kontraktis patriotan pakton. Neniu el la laboristoj ne fervore partoprenis la popolamasajn kampanjojn akuzi la krimojn de imperiistoj, voĉdoni por kontraŭstari Usonon rearmi Japanion, subskribi por ke la kvin potencoj kontraktu pacopakton, lernadi pri politiko kaj disvastigi la patriotan propagandon ktp. Multaj laboristoj ĉiam pensas pri la volontuloj kaj sin kuraĝigas per la brava spirito de la volontuloj. La ŝtalforgistoj de Tangŝan konkure riparis sian elektran fornegojn "Kontraŭbatali Usonon kaj Helpi Koreion" spite de la pli ol 800 gradojn alta temperaturo. Ili diris: "Por defendi la patrion kaj la popolon, la volontuloj sur la Korea fronto riskas eĉ sian vivon, kion do ni ankoraŭ timas!"

Sekve de la disvastiĝo kaj profundiĝo de la kampanjo kontraŭbatali Usonon kaj helpi Koreion, senprecedence ardiĝis la fervoro de la tutlanda laboristaro en lernado pri politiko kaj kulturo. 1,700,000 laboristoj tra la tuta lando partoprenis la lernadon en libertempaj lernejoj kaj multaj funkciuloj kaj laboristoj de fabrikoj kaj entreprenoj universale partoprenis grupojn por ĵurnalo-legado. Multaj laboristoj sentas kvazaŭ io perdiĝus se unu tagon ili ne legas ĵurnalon. Ili atentis la ŝtatajn aferojn tute simile kiel la siajn. La laborista klaso de nia lando daŭre akiros pli multajn kaj pli grandajn sukcesojn en la granda entreprenado de la defendo kaj konstruado de la patrio.

Elĉinigitis Zekun

La Salo-ekstraktejo de Huajpej

Unu el la fame konataj ŝtatposedataj salo-kampoj en Ĉinio estas tiu kiun funkciigas la Salo-ekstraktejon de Huajpej kaj kiu kuŝas inter Pinghaj-Gubernio de norda Kingsu-Provinco en la sudo kaj Sanjang-kang-Haveno de Ŝantung-Provinco en la nordo. Etendiĝante 300 li-ojn tiu ĉi salokampo konsistas el 2,708 parceloj da tero kie salo estas kolektata. En tiu regiono loĝas 40,000 popolanoj kaj estas entute 18,000 salolaboristoj.

Depost la liberigo en 1948 la salo-ekstraktejo estas ekipita per multaj novaj laboriloj. Krom unu ventmuelilo kaj du akvoradoj ĉiu parcelo nun havas ankaŭ pumpilojn kun 600 ĉevalpovoj. Krome la ekstraktejo jam havas malpezan fervojon. En la tuta regiono estas sep kluzoj, 300 digoj, 500 riverbranĉoj por transporti salon, 139 akvokonservejoj kaj 275 publikaj kanaloj kiuj estas konstruitaj aŭ dragitaj depost la liberigo.

Ĉio ĉi tio kontribuas al la pliigo de la produkto de salo. La printempa produkto en 1949 atingis 70 procentojn de la mezkvanto ĉiujara (3,000 tan-oj* po parcelo da salokampo) antaŭ la Kontraŭjapana Milito. Rezulte de la patriotisma konkurs-movado la printempa produkto de la pasinta jaro plialtiĝis proksimume 100 procentojn ol tiu de la jaro 1950 prezentante la plej altan rekordon en 16 jaroj. La kvalito de la salo ankaŭ fariĝas pli bona kaj la laboristoj penas ŝpari konsiderindan parton de la produktokosto. En la printempo de 1951 la produktokosto de salo estis 14 procentojn pli malalta ol la originala taksado.

Por la produkto de la Salo-ekstraktejo de Huajpej pligrandiĝis ankaŭ la merkato kiu nun enhavas tiujn malproksimajn provincojn kiel Junnan, Hupej, Anhuej kaj Honan. Kompare kun aliaj salo-ekstraktejoj de Ĉinio la Salo-ekstraktejo de Huajpej havas la plej vastan merkaton.

Dum la pliigo de produkto, demokratiaj reformoj en organizo ankaŭ estas enkondukitaj por la unua fojo en la historio de tiu ĉi salo-ekstraktejo. La malnovaj feŭdaj sistemoj estas forigitaj kaj la laboristoj ne plu suferas sub la jugo de feŭdisma ekspluatado kaj ilia vivo multe pliboniĝis. La laborpagoj plialtiĝas kaj en la aŭtuno de 1950 la mez-

nombra enspezo de unu laborista familio jam egalas al 2,000 ĝin-oj da greno. La plejparto de la laboristoj portas novajn vestojn kaj ili ŝparas ekstran monon. Tion ili neniam povis fari antaŭ la liberigo.

En la printempo de 1950, la laboristoj organizis la Laboristan Sindikaton de la Salo-ekstraktejo de Huajpej. Sub la gvidado de la Popola Registaro kaj la Laborista Sindikato la vivstato de la laboristoj estas plibonigita. Iliaj loĝejoj estas riparitaj kaj 800 novaj domoj estas finkonstruitaj por plenumi ilian bezonon. Ses san-centroj kaj 12 konsum-kooperativoj estas starigitaj por la bono de la laboristoj.

Nun troviĝas 37 elementaj lernejoj por la gefiloj de la laboristoj sed antaŭ la liberigo troviĝis nur ses. En tiuj lernejoj estas 2,419 lernantoj kiuj prezentas 56 procentojn de la tuta nombro de la geknaboj de la laboristaj familioj. Krome, pli ol 10 pliaĝaj infanoj de la laboristoj vizitas teknikajn institutojn kaj altgradajn lernejojn. Por la laboristoj mem multaj libertempaj kursoj kaj vintraj lernejoj estas starigitaj depost 1949.

Dum la patriotisma konkurs-movado pli ol 1,000 laboristoj montrigis kiel modelaj laboristoj aŭ laborherooj. Ili faris multajn inventojn kaj helpis antaŭenpuŝi produktadon. La Teamo de Li Paŭ-ju estas nun bone konata en la fabriko pro sia enkonduko de interhela sistemo. En tiuj salokampoj kie la supredirita sistemo estas aplikita la produkto pliigis 34.8 procentojn ol en la aliaj salo kampoj.

Dum la kontribu-movado por la ĉinaj volontuloj la mon-donacoj en la daŭro de 10 tagoj superis la sumon difinitan por aĉeti batalaeroplanon kun la nomo de la Salo-ekstraktejo de Huejpej.

La laboristoj sentas profundan dankemon al la Popola Registaro kaj la Ĉina Komunista Partio pro sia nuna plibonigita vivo. Ili ĉiuj atendas esperplene la elektrigon kaj industriigon de la Salo-ekstraktejo de Huajpej en la proksima estonteco.

I. K.

* Ĉina mezur-unuo. 1 tan-o egalas al 50 kilogramoj.

LA GRANDA AMO

(daŭrigo de p. 5)

estis malsekigita, sed la kajereto restis seka. Mi malfermis ĝin kaj trovis ke en ĝi zigzagis kelkaj linioj da malgrandaj vortoj:

“Onjo Dua kontribuis kvin ovojn por aĉeti aeroplanojn. Oĉjo Vu-ŝjue kontribuis litron da tritiko por aĉeti kanonojn por kontraŭbatali Usonajn banditojn...”

Ha! li ĵus iris por monkollekti spite la pluvon. Ial mi sentis amon kaj estimon al ĉi tiu ordinara knabo. Mi stariĝis, tiris lin je lia maneto kaj karesante lian kapon diris: “Frateto, vi estas ja bona knabo en la Epoko de Maŭ Ze-tung. En tia malgrande Videble miaj vortoj lin kuragiĝis, aĝo vi jam faris multe por la patrio.” liaj okuloj liniigis pro ĝojo, liaj manetoj svingiĝis en la aero kaj ride-tante li diris: “Ĉi tiujn objektojn mi povas forvendi por mono. Nun jam kolektiĝis 37,500 juan-oj. Mi ankoraŭ bone propagandos por kontribui pli da aeroplanoj kaj kanonoj.” Li tre naive rajdis sur miajn genuojn

kaj montrante mian brustosignon li legis vorton post vorto. Li diris: “Kompartio, Prezidanto Maŭ, Ĉina Popola Respubliko, Ĉina Popola Liberiga Armeo—ĉiujn ĉi tiujn vortojn mi scipovas bone skribi.” Ŝubite li demandis min kun serioza mieno: “Oĉjo PLA-ano†, divenu kial mi scipovas ilin bone skribi?”

“Mi ne povas diveni. Diru do,” mi intence ŝercis kun li.

Ridetante al mi li diris petole kun flanken klinita kapo: “Ĉar mi ilin amas.”

Jen estas la fino de mia rakonto. Amikoj, kiel vi sentas? Ĉiufoje kiam mi rememoras ĉi tiun rakonton, mi vidas pli klare kiel nia patrio estas arde amata kaj subtenata de sia popolo. Kaj el tia arda amo kaj subteno naskiĝas la granda forto de la patrio.

—Tradukis Sunkaj

† PLA-ano: ano de Popola Liberiga Armeo.

Libereco kaj Feliĉo por la Ji-nacio

Vang Ĉi

Malproksime en Taliang-Montaro de Sikang-Provinco en Sudokcidenta Ĉinio liberan kaj feliĉan vivon ekĝuas la 500,000 ji-nacianoj kiuj vivis maldolĉan vivon dum multaj jarcentoj. Antaŭ pli ol mil jaroj ili estis forpeltitaj de la imperiestroj de la Han- aŭ Tang-Dinastioj el la ebenaĵoj kaj de tiam ili estis rigardataj kiel "malsupera raso." La imperiestroj devigis ilin oferi tributojn kaj la militaristoj kaj Kuomintangoj eltordis de ili monon kiam ajn ebla.

Sed meze de tiu longa, maldolĉa tempo ili travivis kelkajn ĝojajn tagojn kiuj ankoraŭ restas en ilia memoro. En la somero de 1935 ili ektrovis multajn ji-malliberulojn el kiuj la plejparto estis senkulpaj maljunuloj kaptitaj de Kuomintangoj kiel garantiuloj kontraŭ ribeloj kiujn povus organizi la ji-oj. Ili estis liberigitaj de armeanoj al ili nekonataj. Antaŭ ol la kaptitoj reiris hejmen, ĉiu el ili ricevis porcion da greno kaj salo kion ili konsideras kiel altvaloraĵon. La ji-oj neniam antaŭe konis armeanojn kiuj ne murdis, nek rabis, nek faris detruon, ne parolu jam pri donacado.

Pli poste ili aŭdis ke tiuj mirinduloj estis ruĝ-armeanoj kiuj preterpasis tie dum la Longa Marŝo. Memore al la evento multaj infanoj naskitaj tiujare estis nomataj laŭ la Kompartio aŭ la Ruĝa Armeo. Nun, dek ses jarojn post tiu epizodo, la ji-oj denove vivas feliĉan vivon kaj ĉifoje tia vivo daŭros por ĉiam.

En la printempo de 1950 kiam Taliang-Montaro estis liberigita, la ji-oj ankoraŭ sin okupis per primitiva agrikulturo kaj tre malmultaj metioj kaj ilia skriba lingvo konsistis nur el amaso da simbolaj signoj. La plejparto de ili ne havis sufiĉajn manĝaĵojn kaj neniu el ili sciis pri medicino. Krom tio, inter la diversaj gentoj kaj klanoj neniam ĉesis bataloj ofte instigitaj de ĉiuj regantoj de la malnova tempo.

Pasante tra Ĉaŭkio—gubernia urbo en Taliang-Montaro—mi tre ĝojis ke mi povis interparoli unu horon kun Vaĉiamuki, bone konata gvidanto de la ji-nacio kiu gvidis siajn popolanojn kontraŭbatali la Kuomintangan reĝimon. Nun li estas prezidanto de la Aŭtonoma Regiona Registaro starigita de la ji-oj por praktiki memregadon difinitan de la nacia politiko de nova Ĉinio. Li estas simpla kaj sincera homo 36-jara—tia homo ke parolinte kun li nur dum kelkaj minutoj, vi sentas ke vi konas lin jam longtempe. Parolante tiel malrapide kiel kutimas la ji-oj, li fervore diris al mi pri ĉiu ŝanĝo kiu okazis en la vivo de la ji-oj.

"Antaŭ ĉio", ĝoje li komencis, "ni ji-oj estas rigardataj kiel fratoj de ĉiuj ĉinaj popolanoj. En la vintro de 1950 la Centra Popola Registaro en Pekino sendis specialan delegitaron al Taliang-Montaro. Ili vizitis ĉiun hejmon kaj babilis kun ni popolanoj. Kun ili alvenis la kinematograf-, kultur- kaj medicin-grupoj

kaj ili ankaŭ alportis tiajn donacojn kiel viŝtukojn, butonojn, kŭdrilojn kaj fadenon.

"Antaŭ kelkaj monatoj estis starigita ĉi tie hospitalo kun kompetentaj kuracistoj kaj bonaj instalaĵoj. Ĉiu homo povas ricevi senpagan kuracadon. Ŝtatposedataj entreprenoj provizas al ni je malalta prezo grandajn kvantojn da salo kaj ŝtofo kion ni plej bezonas. Siaflanke ili aĉetas de ni je justa prezo bov-kaj ŝaf-felojn kaj dors-harojn de porkoj."

"Ĉu vi jam starigis lernejojn?" mi demandis scivoleme.

"Ankoraŭ ne," li ridetis, "sed baldaŭ ni ilin starigos. Unue ni devas trejni instruistojn kiuj bone povoscias nian novan latinigitan skriblingvon."

Vaĉiamuki prenis malgrandan libron de sur la skribotablo kaj ĝin montris al mi. Tio estis nove eldonita elementa lernolibro en la nova lingvo.

Li diris: "La nova skriba lingvo estas facile lernebla kaj uzebla. Oni povas legi kaj skribi per ĝi post kelkmonata lernado. En la fino de tiu ĉi aŭtuno ni havos tiom da instruistoj kiom ni bezonas por niaj estontaj elementaj lernejoj.

"Jen, ĉio ĉi estas nur la komenco de ĉio bela kio venos kun la estonteco. Kiel membro de la granda familio de frato-nacioj de nova Ĉinio ni devas per plena energio helpi nin mem kaj nian patrolandon fari pluan progreson. Jen kial ni formis nian propran registaron—la unuan en nia historio."

Tio ja ne estis facila afero. Se oni scias kiel longe la ji-oj kutime batalis inter si mem, li ne kredus ke ili povas iam unuigi, ne parolu jam pri elektado de ilia komuna registaro.

Vaĉiamuki rakontis al mi kiel ili ĉesigis la longdaŭran internan bataladon. Tuj post kiam la tuta regiono estis liberigita, la registaraj laborantoj iris al ĉiuj gentoj kaj klarigis al ili kiel ili devas interpaciĝi. Tiam la popolanoj ekkomprenis ke pro la konspirado de la malnovaj regantoj kiu ĉiam kaŭzis ilin batali unuj kontraŭ aliaj, ili ne havis tempon nek forton por organizi ribelojn kontraŭ siaj subpremantoj. Ili ankaŭ rememoris kiel la koruptaj juĝistoj de la iamaj reĝimoj devigis ilin pagi grandajn monsumojn aŭ postulis de ili subaĉetaĵojn antaŭ ol solvi iliajn disputojn.

Do en januaro de 1951 ili volonte kunvenis en Ĉaŭkio. Proksimume 270 reprezentantoj de preskaŭ ĉiuj gentoj kaj klanoj en Taliang-Montaro ĉeestis la kunvenon.

"Imagu kiel ŝtreĉa momento tio estis por ĉiu renkonti vizaĝo-al-vizaĝe tiom multe da siaj malnovaj malamikoj!" diris Vaĉiamuki. "Komence ĉiuj septis

(daŭrigo sur p. 17)

Sukcesoj de Sanitarlaboro en Ĉinaj Fabrikoj kaj Minejoj

En lastaj du jaroj, la sanitarlaboro en fabrikoj kaj minejoj de tuta Ĉinio jam atingis rimarkindajn sukcesojn sub la ĝusta gvidado de la Centra Popola Registaro. La nombro de malsanuloj kaj mortintoj pro vundiĝo en ĉiuj fabrikoj kaj minejoj jam ege malmultiĝis kaj la sanstato de la laboristoj estas plibonigita.

En lastaj du jaroj, la Centra Popola Registaro publikigis unu post alia leĝojn pri laborasekuro, sekurigo al la laboristoj en laborado kaj protekto al ilia sano. En la Ministerio de Higienaj Aferoj de la Centra Popola Registaro, en la higienaj organizoj de la grandaj administraj regionoj, provincoj, urboj kaj en parto de industriaj entreprenoj jam fondiĝis specialaj direktoj por gvidi la higienan laboron en fabrikoj kaj minejoj; jam fondiĝis fundamentaj organizoj de higiena laboro en ĉiu loko kie sin trovas fabrikoj kaj minejoj. Ekzemple en la fabrikoj kaj minejoj de Nordoriento jam funkciis en 1950 kvar higienodirektoj, 18 higieno-laborfakoj, 16 hospitaloj kun ses filioj, du kuracejoj, 265 sanitarejoj, 41 urĝkuracaj stacioj, 24 libertempaj refreŝiĝejoj, 27 infanvartejoj kaj 36 akuŝigaj stacioj. Kaj lastatempe oni faris gravan reformon al la organizo: la simplaj sanitarejoj en fabrikoj estas nuligitaj kaj fondiĝis nova fako por zorgi pri propagando kaj edukado pri higieno kaj aliaj sanitaraj kaj kuracaj laboroj.

Ankaŭ la nombro de higienolaborantoj en la ĉinaj fabrikoj kaj minejoj ege kreskis. Laŭ la lastatempa statistiko pri 17,312 fabrikoj kaj minejoj en tuta Ĉinio ekzistas unu oficiala kuracisto po 880 laboristoj. En Nordoriento la proporcio inter la sanitarlaborantoj kaj laboristoj estis 1:122.4 en 1949 sed 1:84.2 en 1950. Por rapide eleduki sanitarlaborantojn por la fabrikoj kaj minejoj jam fondiĝis 7 institutoj de sanitartekniko sole en Nordoriento, kaj krome en Centrasuda Ĉinio, Tienzin, Ŝanhajo, Cingtaŭ, Mukdeno kaj aliaj urboj nun oni

laŭplane edukadas laborantojn por fabrika higiena laboro.


La temperaturo, humideco kaj ventolado en la fabrikoj kaj minejoj estas ĝenerale kaj rimarkinde bonigitaj. Ekzemple dum tiu ĉi somero, la temperaturo de la maŝinĉambro de la Dua Ŝtata Ŝpinejo en Tienzin estis malaltiĝita de la pasintaj 140° F ĝis 94° F; tiu de la teksoĉambro malaltiĝis de 95 F ĝis 83° F. En Kingŝing, Kiaŭzo, Tatung, Janĝĉuan kaj aliaj karbominejoj la ventolkvanto estas meznombro 4 kubmetroj da freŝa aero por ĉiu persono ĉiuminute. En Kajlin-lakofabriko kaj la Unua Tinkturejo en Ŝanhajo kaj la Tabakofabriko de Tajjuan specialaj aparatoj estas instalitaj por protekti la laboristojn de venena vaporo kaj malsaniga pulvoro.

Por pliriĉigi la higienosciojn de la laboristoj preskaŭ ĉiuj fabrikoj kaj minejoj en ĉiuj regionoj de tuta Ĉinio laŭplane instruas kaj propagandas pri higieno kaj sekurigo. Disvolviĝis kompanjo diversmaniere propagandi kaj instrui al la laboristoj pri sekurigo kaj higieno kaj admonis la laboristojn obeadi memkonscie la labordisciplinojn kaj elkulturi bonan higienan kutimon. Kaj en la Jungli-Aktiniumfabriko en Nankino dekminuta leciono pri antaŭkuracaj scioj estas donata ĉiutage al la laboristoj kaj krome oni ankaŭ propagandas pri higieno per radiodisaŭdigo, kiur okazas unufoje en ĉiu semajno, per bildserioj kaj nigratabula ĵurnalo. Samtempe kun la propagandado oni praktikas, en diversaj fabrikoj kaj minejoj, profilaktikon, fizikan ekzamenon, plibonigon de la sanitara medio ktp. kaj instigas laboristojn por starigi sistemojn kaj paktojn de sekurigo kaj higieno.

Rezulte de la klopodoj de ĉiuj fabrikoj kaj minejoj rilate al sekurigo kaj sanitaro en lastaj du jaroj, la nombro de malsanuloj kaj mortintoj pro vundiĝo ege malgrandiĝis. Laŭ statistiko farita en 1950, la nombro de mortintaj laboristoj kaj laborantoj en karbominejoj de tuta Ĉinio jam malgrandiĝis je 15% kompare kun tiu de 1949; la nombro de vunditoj malgrandiĝis je 25%; la mortoprocento de labristoj kaj laborantoj de tutlandaj karbominejoj malaltiĝis je 35%; la procento de vundiĝo je 57%. Kvankam okazis teruraj epidemioj kiel meningito, rekura febro, tifo, disenterio k.s. last-jare en Nordoriento tamen tre malmulte da laboristoj infektiĝis.

Laŭ la statistiko de Nordoriento la procento de vundiĝo de labristoj kaj laborantoj jam malgrandiĝis de 8.7% de 1949 ĝis 6.8% de 1950; la mortoprocento malgrandiĝis de 3.8% en la unua duonjaro de 1949 ĝis 0.78% de 1950. Samtempe rezulte de la plimultigo de kuracaparatoj kaj la senĉesa plialtiĝo de la politika kaj teknika niveloj de la medicinlaborantoj la resaniĝa procento ankaŭ plialtiĝis iom post iom.

Esperantigis Jang Theing



La Nordorienta Laborista Hospitalo

Vasta Arbaro-Plantado

— Kaŭ Ŝan —

La kamparanoj en Tajiĉen-vilaĝo ĉe la rando de la Mongolia Dezerto estis senkompate forpelitaj de la sablo dum dek jaroj. Ili ofte ne sciis kien la dezerto fine ilin forpelos. Ondoj de sablo enterigis iliajn kampojn, envolvis la stratojn kaj englutis iliajn hejmojn. Tial dufoje en la pasintaj dek jaroj, la vilaĝanoj kolektis iliajn havaĵojn kaj translokiĝis. Nun sablomontetoj denove alte amasiĝas ĉe la rando de la vilaĝo.

Tajiĉen estas unu el la multaj vilaĝoj en la minacata regiono, kiu ampleksas 86,000 kvadratajn kilometrojn en Nordorienta Ĉinio. Tiu ĉi areo estas pli granda ol tiu de Svisio plus Danlando. Tiuj ĉi vilaĝoj estis en konstanta danĝero esti enterigitaj de drivanta sablo de post la freneza detruado de arbaroj fare de la japanoj kaj la Kuomintangaj regintoj. Ĉi tie la sablo-ventego blovas kaj la suno brilas flave preskaŭ tutjare. Kamparanoj pene batalas kontraŭ la naturo sed iliaj rikoltoj pli kaj pli malgrandiĝas. Oni diras ke Mukden, la plej granda urbo en Nordorienta Ĉinio, enteriĝus iutage se la moviĝanta sablo ne estus malhelpita ĝustatempe.

Tamen, nur unu jaron post la establiĝo de la Popola Registaro, la dezerto renkontis grandan malamikon, planon por krei ŝirmajn forstzonojn por haltigi la sablon. Tiu ĉi plano estos efektivigita en dekdu jaroj. La kamparanoj en tiu ĉi regiono penas mallongigi la tempon. Ili diris: "Se la registaro povas provizi al ni per sufiĉaj arbidoj, ni povas planti nian kvoton en tri jaroj." Liberigitaj el la malnovaj katenoj de feŭdismo, tiuj ĉi kamparanoj pruviĝis entuziasmaj laboristoj. Rezulte 4,000 hektaroj estis sukcese plantita jen la printempo de 1951. Centoj da antaŭaj forstlaboristoj ricevis pluan trejnon, por ke ili povu efektiviĝi estonte la planon de arbaro-plantado.

En la tempo kiam la plano estos komplete efektivigita post dek unu jaroj, ĉiu deko aŭ dekduo da hektaroj da tero estos ĉirkaŭita de kontraŭventaj forstoj kaj ĉiu deko da kilometroj estos provizita per ŝirma forstzono 30 ĝis 50 metrojn larĝa. Arboj estos ankaŭ plantitaj sur la montoj kaj laŭ la bordoj de riveroj

por malhelpi erozion. Superakvegoj, senpluveco, sablo-ventegoj kaj epidemioj estos malebligataj aŭ maloftigitaj kaj la klimato estos plibonigita.

Estas taksate ke rikoltiĝos 2,480,000 pluaĵ tunoj da greno ĉiujare rezulte de pliigo de la produkto pohektara kaj uzebliĝos 2,500,000 pluaĵ hektaroj da tero. La arbaraj produktaĵoj valoros pli ol 940,000 tunojn da greno. Krome, la loĝantoj en la regiono havos pli ol sufiĉe da fajroligno kaj plibonajn kaj plihigienajn vivkondiĉojn.

Krom la decido konkeri la dezerton en la Nordoriento, nova Ĉinio multe atingis en arbarokreskigo en aliaj regionoj dum la pasintaj du jaroj. En la jaro 1950 sur pli multe ol 123,000 hektaroj da tero forstoj jam estis plantitaj, kaj individuaj kamparanoj plantis pluaĵn 300 milionojn da arboj. Dum la printempo de 1950 sola sur 200,000 hektaroj da tero (areo pli granda ol tiu plantita dum la 22 jaroj sub la Kuomintangareĝimo) estis forstigitaj. Pli ol 100,000 loĝantoj en gubernioj de okcidenta Hopej-Provinco partoprenis en la arboplantado en 1950. Rezulte de tio preskaŭ ĉiuj sablodezertoj tieaj estas ĉirkaŭitaj de kontraŭventaj forstoj.

Krom plantado, ĉiaj penoj estas faritaj por konservi arbarojn kaj krei novajn. Regionoj kie sin trovas nur maldensaj arbaroj estas aparte zorgataj kiel arbaro-konservejoj, kiuj estas severe gardataj kontraŭ paŝtado kaj arbofaligo. Per natura kreskado, la nombro de arboj en tiuj ĉi regionoj rapide pligrandiĝis. Samtempe la ĉefaj minacoj al ĉinaj arbaroj—fajro kaj senplana arbofaligo—estas kontraŭbatalataj. En 1950, arbaraj fajroj estis malpliigitaj je 35 procentoj kompare kun tiuj de 1949 dank' al la kunaj penadoj de la registaro kaj la popolo. Pli ol 20,000 grupoj estis organizitaj de la popolo por gardi kontraŭ tiuj ĉi du detruaj fortoj.

El la tuta areo de Ĉinio de proksimume 933,000,000 hektaroj da tero, nur 50,000,000 hektaroj, aŭ nur pli ol 5 procentoj, estas arbaro. Estas ankoraŭ longa vojo kiun oni devas iri por atingi kaj tenadi la plej favoran arbarkondiĉon por la lando. Sed la Popola Registaro, per la

(daŭrigo sur p. 23)

PLI BONA VIVO POR MINORITATOJ EN NORDOKCIDENTA ĈINIO

Nur du jarojn post la liberigo, libera kaj feliĉa vivo jam komenciĝis por 6,300,000 popoloj de 16 naciaj minoritatoj en Nordokcidenta Ĉinio kiuj formas ĉirkaŭ 20 procentojn de la loĝantaro de tiu regiono.

En la Nordokcidento, aŭtonomaj regionoj jam establiĝis—de la Tungŝiang- kaj Tibet-nacianoj en Kansu-Provinco, kaj mongoloj en Ningŝia-Provinco. Pliaj aŭtonomaj regionoj fondiĝos en tiu ĉi regiono ĉiujare. Tie, kie diversaj nacioj vivas intermikse, ili jam elektis siajn reprezentantojn por partopreni la lokajn popolajn registarojn. Nun, pli ol 27,000 kadroj el diversaj minoritatoj funkcias sur diversaj registaraj postenoj. Nombro da ili ricevas specialan trejnadon por ke ili fariĝu teknikaj laborantoj en higieno, industrio, komerco kaj la artoj.

La minoritatoj nun ĝuas ankaŭ medicinajn oportunojn por la unua fojo en sia historio. 760,000 popoloj de diversaj nacioj ricevis medicinan prizorgon aŭ injektojn kontraŭ epidemioj. Ĉirkaŭ 2,500,000 dombestoj estas vakcinitaj aŭ resanigitaj. Bredado de dombestoj kaj agrikulturo en grandaj partoj de la minoritataj regionoj nun jam atingis aŭ superis la antaŭliberigan nivelon.

La minoritatoj en Nordokcidenta Ĉinio, kiuj ĝemadis sub la reakcia regado de naciŝupremado kaj interna malpaciĝo nun vivas pace kaj kunlaboreme sub la gvido de la Popola Registaro. Ili jam ligis sian estontecon kun tiu de sia patrolando kaj sekve aktive partoprenis en la kampanjo rezisti Usonan agresadon. Akaj, iu mongolo, vortigis la sentimenton de la popolamasoj de la minoritatoj kiam li diris ke se ili ne rezistus la Usonajn invadantojn en Koreio sed lasus ilin invadi Ĉinion, la minoritatoj denove devus suferi ŝupremadon kaj mizeron. Alie, per sukcesa ple-nomo de la taskoj en tiu ĉi kaj aliaj kampanjoj, la minoritatoj, frate unuiĝinte kun la ceteraj samlandanoj, certigos al si la brilan estontecon de la tuta nacio.

La Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio



Popola Demokratio—Konferencoj de Popolaj Re-
zentantoj okazis en ĉiuj *ligoj* kaj *standardoj* (ambaŭ
adminstraj distriktoj) de Interna Mongolio. En la
bildo reprezentantoj de la Silingolligo ekster sia
konferencujo.

La unua naci-aŭtonoma regiono establita en la Ĉina Popola Respubliko
montras kiel la Nova Demokratio ebligas al antaŭe ekspluatata kaj
mortanta nacia minoritato sin liberigi, rapide disvolvi sian ekonomion
kaj kulturon kaj marŝi al prospero kaj feliĉo.



Ĉevalo-riĉo—tipa sceno sur la vastaj herbejoj de Interna Mongolio. Libero de paŝtado por ĉiu jam
emancipis la antaŭe ekspluatatajn paŝtistojn.

Nova In

Feŭda kaj imperiista
estis ekstermantaj la
la Ĉina Komunista




La Popola Gvidanto—Ulanfu, veterana revoluciisto kaj prezidanto de la Popola Registaro de la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio vizitas la Ĉahar-ligon.



Rezistu Usonan
la slogano sur
Demonstracio, 19
Regio:

e Natamu-foiro—Pro la nacia prosperiĝo, la aĉetpovo de la popolanoj e Internu Mongolio en 1950 estis 460 procentoj de tiu en 1948. Ianufakturaĵoj estas rapide venditaj de ŝtata komerca stando ĉe la foiro.

Junularo—La libera junularo de Internu Mongolio prezentas grandajn perspektivon tiel vastan kaj brilan



erna Mongolio

kspluatado, malsano kaj nutromanko
mongol-nacion. Liberigo gvidata de
rtio jam alportis novajn esperojn
al ilia vivo.



reson kaj Helpu Koreion!—diras
dego de honoro je la Majtaga
en Ulanhot en la Aŭtonoma
e Interna Mongolio.



Liberigitaj Virinoj—Delegitoj al konferenco de popolaj reprezentantoj
enskribas siajn nomojn en la nomliston. La virinoj de Interna Mogolio
havas egalan rajton decidi sian destinton same kiel viroj.

na Mongolio hodiaŭ havas
el iliajn senlimajn stepojn.

Fino de la Pesto—Mongolaj medicinaj specialistoj laborantaj. Pesto viktimitigis
13, 000 homojn en 1947. Kontraŭpesta laboro reduktis la ciferon ĝis 17 en 1950.



DIABLOJ ŜANGITAJ EN HOMOJN


P. Ĉ. Ju

Vizito al la Ĉingho-Farmo kie la antaŭaj Kuomintangaj spionoj kaj sabotuloj estas remuldataj en civitanojn de nova Ĉinio.

Ĉesis la aŭtuna ekpluvo kaj helbluigis la ĉielo. De la oriento venis mara zefiro, forpelante la tagmezan varmecon de la vaste etendiganta marborda ebenaĵo Nordĉinia. Nia aŭto zumante kuris antaŭen en la verdaĵo de vasta rizkampo. Ambaŭflanke de la larĝa ŝoseo, altkreskaj tigoj kliniĝis al la vento pro la pezaj grenspikoj, kvazaŭ ili nin salutus. La loko nun havis riĉan nuancon de la sudo.

Liang Ven-jing, vic-direktoro de la Ĉingho-Farmo, starante sur la piedtabulo, direktis la ŝoforon kaj klarigis ĉion kion ni preterpasis sur la vojo ĉirkaŭ la farmo. Kiel la aliaj kadroj, li estis sunbrunigita kaj fortika, kaj aspektis tipa kamparano. "Ĉi tie estas la centro de la farmo," li diris kiam ni transpasis ponton trans kanalo.

Montrante al la rizkampoj ĉe ambaŭ bordoj de la kanalo, K-do Liang diris kun fiero de juvelisto diskutanta pri siaj altvaloraj gemoj, "Ĉi tiu estas terpeco de '300-grajna' rizo—ĉiu spiko kun pli ol 300 grajnoj!—kaj la tero tiuflanka estas de *jinfang*-rizo kiu havas nur 120 grajnoj ĉiuspiko, sed la grajnoj estas multe pli grandaj. Ni ankaŭ havas *ajkuo*- kaj *ŝujjuan*-specojn. Sed kiaj ajn ili estas, nia rizplantaĵo kreskas preskaŭ duoble tiom altaj kiom tiu de niaj najbaroj."



La trietaĝa ĉefoficejo estas konstruita el brikoj produktitaj de la Farmo.

"Kiam ni unue venis ĉi tien," li daŭrigis, "la loko estis alkaleca. Ĝi devis esti lavita antaŭ ol esti plantita. Ni elfosis ĉi tiun ĉefan kanalon kaj multajn pli malgrandajn defluejojn, transmovante milojn da kubmetroj da tero por lavi kaj kulturi ĉi tiujn novajn rizkampojn. Ĉio ĉi tio kaj la kampa laboro estis plenumitaj de niaj studentoj."

"Viaj studentoj?" demandis unu el la vizitantoj, mirigite.

Rimarkinte ke li estis miskomprenita, Liang respondis:

"Tio estas la krimuloj mem. Vere ili estis la antaŭaj sekretaj agentoj de Ĉiang Kaj-ŝek kaj alitipaj krimuloj, tamen ĉi tie ne estas malliberejoj. Ili estas reformataj ĉi tie per laboro. Tial ni neniam nomas ilin

malliberuloj. Ili estas aktuale reedukataj kiel en lernejo. 'Ĉingho,' kiel vi scias, signifas riveron de pura akvo. La nomo estas simboleca."

Ni vizitis la "vilaĝojn" en kiuj la "studentoj" vivas. La "studentoj" estas ja ĉiuj krimuloj: antaŭaj partoprenantoj en la krimoj de la Kuomintanga teroro kontraŭ la popolo, kondamnitaj specialaj agentoj, sabotuloj, profesiaj spionoj, spionoj kaj denuncantoj en la sindikatoj kaj studentaj movadoj, krimaj bandedoj, perfortuloj, ĉantaĝuloj kaj koruptuloj. Nun ili estas organizitaj por krea laboro.



Miaŭ Kan, gradigito de la Farmo ĝoje rigardas kun sia Familio la fruktojn de Sia laboro.



Kaŭ Hui-min, antaŭa sekreta agento de Kuomintango, jam fariĝis modela brikoferisto. Li ne volas forlasi la farmon kvankam li havas liberon tion fari.

Ili vivas en vicoj da novaj bangaloj* kun vitrofenestroj, simple meblitaj per skribotabloj kaj brik-litoj, kiuj povas esti hejtataj dum vintro. Kvin puraj staploj da litaĵoj estis metitaj sur ĉiu brik-lito. La plejparto de la krimuloj sin vestas per vestoj senditaj de siaj familioj. Kiuj ne povas sin provizi per propraj vestoj ricevas uniformojn.

Ĉio en ĉi tiu farmo estas nove konstruita. Ĉiu vilaĝo havas sian kooperativan vendejon, kie la loĝantoj povas aĉeti ĉiutagajn necesajojn—cigaretoj, alumetoj, mantukoj, dentpastaĵo, papero, kovertoj, lardo, salo, k. t. p.—je malaltaj prezoj. Tri sufiĉkvantaj manĝoj estas provizataj ĉiutage—cerealoj, legomoj, fiŝo kaj viando. Tiam estis la krabo-sezono kaj la loĝantoj kaptis krabojn en la irigaciaj kanaloj kaj havis bongustajn manĝojn.

“Vilaĝa” vivo centriĝas ĉirkaŭ ilia propra klubo kaj aŭditorio kun scenejo prilumigata de fluoreskaj lampoj. En unu vilaĝo ni vidis la provludon de *Perlo Fang*, dramo verkita de Laŭ Ŝeh pri la reformo de malnovaj intelektuloj, direktata kaj ludata de la “studentoj” mem. En la vespero kiam ni alvenis la farmon, la speciala Kultura kaj Eduka Grupo prezentis kun sia orkestro programon enhavantantan kantojn de “grandtamburo”, † komikajn dialogojn, mallongajn teatraĵojn, kaj lekcion per lanternaj lumbildoj pri la temo kiel krimuloj estis remulditaj per laboro.

Ĉiu “vilaĝo” ankaŭ havas sian bone ekipitan kuracancambron kaj escepte unu aŭ du kadrojn kiuj prizorgas administrajn aferojn, ĉiuj medicinaj laborantoj ĉi tie estas antaŭaj krimuloj. Ĉien Ju-nien, la iama favorato de Taj Li, gestapoĉefo de Ĉiang Kaj-ŝek, nun servas kiel helpanto en iu kuraca ĉambro. Li venis ĉi tien ĉar li estis salajrata Kuomintang-agento en la Jenĉing-Universitato kaj la Pekina Unia Medicina Kolegio antaŭ la liberigo, spionis la progreseman studentojn kaj arestigis multajn el ili. Unu el liaj kolegoj estas Vang Ĉung-ĉin, la antaŭa intendanto de la Hospitalo de la Buroo de Publika Sekureco en Pekino dum la Kuomintangaj tagoj, kiu falsis atestaĵojn por defendi Pearson, la Usona armeano kiu perfortis ĉinan studentinon en Pekino en 1945. Anstataŭ terkulturado, tiuj homoj estas permesitaj praktiki siajn civilajn kapablojn kaj krom manĝo, kelkaj el ili ricevas poŝmonon egalvaloran al 30 ĝis 50 ĝinoj da milio ĉiunonate.

Ĉiuj domoj kaj la trietaĝa oficejo, la maŝinfabrika kaj la grenejoj estas konstruitaj el la brikoj faritaj de la propra brik- kaj tegol-fabrika de la farmo. Ĝi produktas ne nur sufiĉajn brikojn kaj tegolojn por la konstruaj projektoj de la farmo, sed krome grandan kvanton da superfluo por vendo.

Aliajn memfaritajn produktaĵojn de la farmo ni vidis en la 11 pumpiloj uzataj por irigacii la rizkampojn. Ili estas movataj de la tute memfaritaj motoroj, kiuj estas funkciigataj de la antaŭaj krimuloj kiuj ellernis ĉi tiun novan laboron en la farmo.

Laborhoroj de la farmo ŝanĝiĝas laŭsezone ĉirkaŭ la normala ok- aŭ naŭ-hora tago. Dum nia vizito, preparoj estis farataj por la venonta rikolto. Dum kvar horoj en la antaŭtagmezo kaj tri en la posttagmezo, la homoj kaj la kadroj estis forigantaj herbaĉojn, kunligantaj riztigojn kiuj estis tro pezaj pro la grajnoj kaj pavimantaj la farmplacon por draŝi kaj fari fojnon, sed kiam la rikoltempo venos, kompreneble la laborhoroj estos neeviteble pliigitaj.

En la vesperoj post laboro dum la relative malstreĉaj sezonoj, tiuj antaŭaj krimuloj kolektiĝas por studi. Ili legas la samaj kiel tiuj indikitaj por la kadroj, inkluzive de libroj pri marksismo-leninismo kaj la instruoj de Maŭ Ze-tung. Ili jam studis kaj diskutis pri *La Historio de la Disvolviĝo de la Socio*, *La Nova Koncepto pri Vivo*, *La Komunista Programo* kaj *Pri la Popoldemokratia Diktatoreco* de Maŭ Ze-tung. Ili ankaŭ legas la *Popolan Tagjurnalon* de Pekino kaj la *Remuldan Ĝardenon*, redaktatan kaj eldonatan dufoje ĉiusemajne de ilia propra Kultura kaj Eduka Grupo. La diskutaj grupoj ankaŭ studas kurantajn eventojn kaj samtempe tiuj kiuj estas alfabetaj aŭ havas malmulte da ĝenerala edukado estas instruataj legi kaj skribi de siaj pli instruitaj kamaradoj. Unu junulo, kun kiu ni interparolis, ellernis kelkcent ideografojn dum sia kvarmonata restado ĉe la farmo. Lia templimo venis, sed li ne volis foriri. Kiam ni lin vidis, li estis portanta novan ĉemizon kaj ledŝuojn. Demandite kial li volas restadi ĉi tie, li respondis senkaŝe, “Mi estas orfo, mi konas nenion pri la amo kaj edukado kiujn nur gepatroj povas doni. Tamen ĉi tie mi ricevis ilin de la kadroj. Nur nun mi ekkonas kia hejmo estas. Ĉu orfo povas forlasi sian hejmon kiam li ĝin trovis?”

La farmo ne nur prizorgas la personajn bezonojn de la krimuloj. Fabriko de pajlosakoj estas fondita en la farmo por la edzinoj de krimuloj kiuj ne trovis taŭgan laboron por sin vivteni. En la komenco ili sciis nenion pri sakofarado kaj vivis tute depende de la farmo. Sed nun multaj el ili jam fariĝis tre spertaj, kaj akiras ĉiunonate poŝmonon egalvaloran al 30 ĝinoj da milio krom manĝo. Eduka oportuno estas ankaŭ donata al ili kaj iliaj infanoj. Geknaboj lernejaĝaj vizitas lernejon dum ŝancele paŝantaj infanoj estas prizorgataj en infanĝardeno.

Ĉiun duan semajnofinon la loĝantoj de la farmo estas permesitaj pasigi kun siaj edzinoj. Demandite kiam impreson ili havas pri siaj edzoj de post ilia alveno al la farmo, la virinoj unuanime konsentis ke iliaj viroj, kiuj estis kruelaj kaj malmolaj al siaj propraj familianoj en la pasinteco, fariĝas nun multe pli simpatiaj kaj bonkoraj. Ili esperas ke la morala reviviĝo de iliaj edzoj kondukos ilin al ilia propra emancipiĝo.

Je la tria tago de nia restado en la farmo, k-do Li Ji-ping, la direktoro, parolis al ni en sia eta sed arte dekoraciita gastĉambro. Kelkaj pentraĵoj de la domoj kaj vidaĵoj de la farmo pendantaj sur la muro aspektis pli vivecaj kiam ili estis plibeligitaj de la realaĵoj ekster la fenestro.

La direktoro, fervora kaj malrapide parolanta, petis pardonon ke li malfruigis sian raporton. “Mi intence prokrastis ĝin ĉar mi volas ke vi mem vidu per viaj propraj okuloj kiel ĉio iras ĉi tie.” Li citis la vortojn en la lasta akto en la opero *La Blankhara Knabino*: “‘En nia nova socio diabloj estas ŝanĝitaj en homojn.’ La homoj kiujn vi renkontis ĉi tie estis diabloj en la malnova socio. Sed escepte tre malmultajn, ili fariĝas konsciaj pri sia krimo subpremi la popolon en la pasinteco. Nun ili decidis servi al la lando kaj la popolo per duobligitaj klopodoj por sin renovigi.”

Elĉinigiŝ Nojo Lo.

* *bangalo*: unuetaĝa domo

† *grandtamburo*: speco de kantorakonto, kiun oni kantas frapante tamburon.

Edziĝo de Erhejĉjo

Ĉaŭ Ŝu-li*

1. Tabuoj de Profetoj

Estas du profetoj en Liukia-valo. Unu el ili estas Ĉuko II** en la suda vilaĝo kaj la alia estas Feino III en la norda vilaĝo. Ĉuko II originale nomiĝis Liu Ŝiuteh. Iam li estis komercisto. Ion ajn faronte, li ĉiam antaŭe petas aŭguron de la Ok Sanktaj Signoj aŭ konsultas konsilojn en la Imperia Almanako. Feino III estas la edzino de Ju Fu de la norda vilaĝo. Je la 1-a kaj la 15a de ĉiu monato, portante ruĝan tolon sur la kapo, ŝi anoncas ke diino enkorpiĝis en ŝin.

Ĉuko II tabuas la vortojn "ne konvene por semi", kaj Feino III siavice, la vortojn "kaĉiĝas la miligrajnoj". Jen estas du anekdotoj pri tio: En iu printempo ege sekigis. Ĝis la tria de la kvina monato laŭ la luna kalendaro pluvis nur kvar fingrojn profunden. La sekvintan tagon ĉiuj rapidis semi en sia kampo. Konsultinte la Imperian Almanakon kaj kalkulinte per siaj fingroj, Ĉuko II diris, "Hodiaŭ ne estas konvene por semi." La kvina tago estis la Mezsomera Festo kaj li neniam laboris en tiu tago, tial li denove ne semis. La sesa ja estis bonaŭgura tago, tamen, bedaŭrinde, jam sekigis la tero. Tial kvankam li klopodis semi siajn kvar muojn da milio, apenaŭ duono elĝermis. Denove pluvis nur en la 15a kaj ĉiuj aliaj plugis en sia kampo, nur Ĉuko II kun siaj du infanoj resemis en vakaj lokoj kie la milio ne sukcesis elĝermi. Dum manĝtempo najbara junulo renkontis lin kaj demandis. "Maljunulo! Ĉu estas konvene por semi hodiaŭ?" Ĵetinte al li straban rigardon, Ĉuko II sin turnis hejmen. Kaj inter la ĉeestantoj eksplodis ridado kaj disfamiĝis la afero kiel ridindaĵo.

Feino III havas filinon nomatan Ĉinjo. Iutage patro de Kin-vang venis konsulti Feinon III pri sia malsano.



Nur post malmultaj tagoj jam amasiĝis granda grupo.
Ĉiutage ili ŝercis kaj ridis ĝoje kaj brue.

Ŝi kantis sidante malantaŭ la incensotablo kaj patro de Kin-vang aŭskultis surgenu antaŭ ĝi. Tiujare Ĉinjo estis nur naŭjara. Metinte milion en la kaldronon por la tagmanĝo, ŝi aŭdis la agrablan kantvoĉon de sia patrino kaj iris aŭskulti ĉe la tablo tute forgesante pri la kuirado. Kiam patro de Kin-vang eliris urini, profitante lian foreston la patrino diris al ŝi, "Rapidu elkaldronigi la milion! Kaĉiĝas la miligrajnoj!" Neaten-dite tiujn vortojn aŭdis patro de Kin-vang kaj reirinte ilin diskonigis. De tiam, ŝin vidante, ŝercemuloj ĉiam intence demandis al iu alia. "Ĉu kaĉiĝas la miligrajnoj?"

2. Deveno de Feino III

Feino III fariĝis mediumino antaŭ tridek jaroj. Tiam ŝi estis nur 15 jara, ĵus edziniĝinta al Ju Fu kaj estis la plej bela virino en la suda kaj norda vilaĝoj. Ju Fu estis honesta junulo, ne babilema, kaj nur povosciis penlabori en la kampo. Lia patrino antaŭlonge mortis. Kun li vivis nur lia patro. Kiam ili iris al la kampo, restis hejme nur la novedzino. Junuloj vidis ke la novedzino estas tre soleca. Iom post iom ili memvole venis ŝin akompani. Nur post malmultaj tagoj jam amasiĝis granda grupo. Ĉiutage ili ŝercis kaj ridis ĝoje kaj brue. Tio fine fariĝis netolerebla al la patro, kiu iutage eksplodis de kolero kaj severe riproĉis kaj insultis la junulojn. La junuloj estis forpeltitaj, sed la novedzino malpaciĝis kun li. Ŝi ploris tutan tagon kaj tutan nokton, nek tualetis nek manĝis. Ŝi kuŝis sur la terlito kaj neniu povis ŝin persvadi ellitiĝi. La patro kaj filo ne sciis kion fari. Najbara maljunulino venigis por ŝi sorĉistinon, kiu mediumis en ŝia hejmo, dirante ke Feino III elektis ŝin sia mediumino. Kaj ankaŭ ŝi kantvoĉe sin proklamis la Feino. Kaj de tiam ŝi mediumis je ĉiu 1-a kaj 15a tago de la monatoj. Ankaŭ la aliaj bruligis incenson antaŭ ŝi por peti bonan fortunon kaj kuracon por malsano. Tiel stariĝis la incensotablo de Feino III.

Oni povas diri, ke junuloj vizitis Feinon III pli por rigardi la feinan figuron ol peti aŭguron. Diveninte ilian veran intencon, ŝi des pli bela sin vestis des pli glata kombis sian hararon, des pli brilaj poluris siajn harornamaĵoj kaj des pli zorge ŝminkis la vizaĝon per pudro, ke la junuloj des pli kroĉiĝis al ŝi.

Tio estis antaŭ tridek jaroj. La tiamaj junuloj nun jam estas homoj kun lipharoj kaj havas siajn filojn kaj bofilinojn. Tial, krom kelkaj maljunaj fraŭloj, ili jam ne plu havas la plezuron viziti Feinon III. Ne kiel la aliaj estas Feino III. Kvankam jam 45jara, tamen ŝi ankoraŭ ŝatas esti maljuna belulino. Sur ŝiaj malgrandaj ŝuoj ankoraŭ garniĝas galono. Kalviĝis ŝia verto, tamen ŝi ĝin kovris per nigra tuko. Estas bedaŭrinde nur ke la pudro ne povas glatigi la sulkojn sur ŝia vizaĝo kaj ĝi aspektas azena fekaĵo kovrita de prujno.

Ne plu venas la malnovaj amantoj. La kelkaj maljunaj fraŭloj ne povas kontentigi Feinon III. Ŝi denove grupigis ĉirkaŭ sin amason da knaboj, pli multaj kaj pli belaj ol la malnovaj amantoj en la pasinteco.

Per kio ŝi grupigis ĉi tiujn junulojn? La sekreto kuŝas en ŝia filino Ĉinjo.

3. Ĉinjo

Ses infanojn naskis Feino III, sed kvin el ili mortis infanaĝaj kaj restas ĉe ŝi nur filino nomata Ĉinjo. Kiam ŝi estis nur du- aŭ tri-jara, ŝi jam estis tre lerta kaj saĝa. La malnovaj amantoj de Feino III tre ŝatis la knabinon enbrakumi. Ĉi tiu diris, "Ŝi estas mia infano," kaj tiu diris, "Ŝi estas mia." Kiam ŝi atingis la aĝon 5- aŭ 6-jaran ŝi eksciis ke tiuj vortoj estas malicaj. Ŝia patrino al ŝi instruis, ke se iu ankoraŭ tion diros, lin respondu, "estas via onklino." Post kelkaj fojoj efektive neniu plu tion diris.

Ĉijare Ĉinjo estas 18-jara. Flirtuloj en la vilaĝo diras ke ŝi estas multe pli bela ol ŝia patrino estis junaĝe. Junuloj ĉiam ŝatas ion paroli kun ŝi, ĉu ili havas ion por paroli aŭ ne. Se ŝi lavas vestojn, la junuloj ankaŭ iras lavi la siajn; se ŝi kolektas manĝeblajn foliojn sur arbo, ankaŭ ili iras kolekti.

Dum manĝo la najbaroj ŝatas iri kun sia manĝelpelvo al ŝi por iom sidadi kun ŝi, kaj tiuj en la suda vilaĝo volonte iras duonan kilometron kaj ne sentas tion tro malproksima. Tio jam estas malnova kutimo de tridek jaroj. Tamen la sama fervoro inter la juna generacio ja estas nova fenomeno en la lastaj du aŭ tri jaroj. Komence Feino III ankoraŭ opiniis ke ŝi ankoraŭ posedas allogecon al junuloj. Sed post longtempa observo, ŝi trovis ke la junuloj ne tre intimas kun ŝi. Nur tiam ŝi ekkomprenis ke ili venas ne pro ŝi sed pro Ĉinjo.

Tamen Ĉinjo ne estas kia Feino III. Kvankam ŝi same libere interparolas kaj ridas kun aliaj, tamen efektive ŝi bone tenas sian virgulinecon. Dum la lastaj du aŭ tri jaroj nur al Erhejĉjo ŝi esprimas sian preferon. Iun antaŭtagmezon en la somero antaŭ du jaroj, ŝia patro iris al la kampo kaj ŝia patrino iris viziti najbaron. Nur Ĉinjo restas hejme. Tiam venis Kin-vang. Ridaĉante li diris al Ĉinjo, "Nu, nun estas bona okazo por ni, ĉu ne?" Ŝi respondis al li severe, "Kin-vangĉjo, de nun bonvolu paroli dece! Vi jam estas viro edziĝinta!" Kin-vang faris lipgrimacon kaj diris, "Ej! vi ne bezonas hipokriti virtecon! Se venus Erhejĉjo, vi certe ĉion cedus al li! Favoron disdonu al ĉiuj kaj mi vin indulgos. Se vi volas esti virta, vi devas unue esti senmakula!" Tion dirante li kaptis Ĉinjon je la brako kaj flustris, "Ne plu afektu!" Neatendite Ĉinjo laŭte kriis, "Kin-vang!" Li haste ŝin forlasis kaj elkuris. "Vi atendu!" grumblante li forŝtelis.

4. La Kuzoj Kin-vang kaj Ŝing-vang

Kin-vang estas malamata de ĉiuj en la Liukia-valo, krom lia kuzo Ŝing-vang, kiu estas amika kun li.

Patro de Kin-vang, kvankam ankaŭ kamparano, estas tigro en la vilaĝo, bandestro dum kelkdek jaroj. Li estas sperta ŝnurligi kaj batpuni homojn. Atinginte



Ĉuko II diris: "Hodiaŭ ne estas konvene por semi."

sian 17- aŭ 18-jaraĝon, li fariĝis bona helpanto de sia patro. Ankaŭ Ŝing-vang jam scipovis helpi la tigran manĝi la viktimon. De tiam patro de Kin-vang ne plu bezonas levi siajn manojn por iun ŝnurligi. Tion tuj faras anstataŭ li Kin-vang kaj Ŝing-vang je lia nura ordono.

En la komenco de la Rezistmilito kontraŭ Japanio ĉie estis perfiduloj, malamikaj spionoj, disbatitaj trupoj kaj banditoj. Tiam patro de Kin-vang jam mortis. La du kuzoj fariĝis kunlaborantoj de iu disbatita trupo, servis por ili kiel kondukantoj en homrabado kaj marĉandantoj en reaĉeto de la rabitaj homoj. Ili tiel agis samtempe kiel sorĉistinoj kaj diabloj kaj ŝajnis sin amikaj al ambaŭ flankoj. Poste venis la komunista Okavoja Armeo, kiu ekstermis la disbatitajn trupojn kaj la banditojn. Kaj tiam revenis al la vilaĝo la du kuzoj.

La montanoj ja estis malkuraĝaj kaj post kelkaj monatoj da granda malpaco kaj morto de multaj homoj ili fariĝis des pli timemaj. En aliaj pli grandaj vilaĝoj stariĝis vilaĝaj administrestroj, diversaj nacicavaj organizoj kaj milicaj komitatoj. Tamen en Liukia-valo, krom la vilaĝestro sendita de la gubernia registaro, neniu volis esti kadroj por publikaj aferoj. Baldaŭ la gubernia registaro alsendis politikajn laborantojn por elekti vilaĝajn kadrojn. Kin-vang kaj Ŝing-vang vidis ke tio estas bona ŝanco por alpreni aŭtoritaton. Ankaŭ la vilaĝanoj esperis ke iuj surpronos sur sin la respondecon. Tiel Ŝing-vang estis elektita ĉefa komitatano de la Milica Komitato kaj Kin-vang komitatano de la Vilaĝa Administrestro. Eĉ la edzino de Kin-vang estis elektita prezidanto de la Virina Nacisava Asocio. Por plenigi aliajn vakantajn poziciojn estis elektitaj kelkaj maljunuloj. Nur por la taĉmentestro de la Junaj Kontraŭ-japanaj Pioniroj oni ne povis elekti maljunulon. Ŝing-vang konsideris Erhejĉjon knabo bela kaj plaĉa kaj frivole lin proponis por tiu pozicio kaj la propono estis tuj aprobita. Kvankam Ĉuko II, la patro de Erhejĉjo, tion ne aprobis, tamen li timis ofendi Kin-vang kaj nenion diris.

La vilaĝestro, veninte de alia loko, ne bone komprenis la cirkonstancojn en la vilaĝo. Tial Kin-vang kaj Ŝing-vang des pli aŭdacis. Post la dorso de la



Estante senkulpa, Erhejêjo nenion konfesis kaj restis firma en memdefendo.

vilaĝestro ili libervole ordonis ĉiujn en la vilaĝo. En la lastaj jaroj, kvankam kelkaj aliaj vilaĝaj respondeculoj estis anstataŭitaj, tamen ili du restas firme en siaj pozicioj. Kvankam la vilaĝanoj ĝisoste ilin malamas, tamen neniu kuraĝas diri eĉ unu vorton, timante ilian venĝon kiam oni ne povas ilin forigi.

5. Erhejêjo

Erhejêjo estas la dua filo de Ĉuko II. En iu kontraŭ-balaa batalo, li mortpafis du malamikojn kaj estis premiita kiel superega pafisto. Lia beleco estas konata ne nur en Liukia-valo. Kiam li ludas rolon en dramo dum festo, la okuloj de virinoj ĉiam lin sekvis, kiun ajn vilaĝon li iris.

Erhejêjo neniam vizitis lernejon, sed nur lernis kelkajn ideografojn ĉe sia patro. Kiam li estis sesjara, lia patro komencis instrui al li ideografojn. La legaĵo estis nek la klasikaj libroj nek lernejaj lernolibroj. En la komenco li lernis la 10 ĉielajn ciferojn, 12 terajn ciferojn, 5 elementojn, 8 sanktajn signojn, la nomojn de la 64 aŭguraj formuloj ktp., kaj poste librojn pri fizionomiko, sorĉarto, aŭgurado, kaj similaj superstiĉaj artoj. Li estis saĝa de sia junaĝo kaj ellernis la artojn kalkuli pri la 12 horoskopaj simboloj, aŭguro per moneroj ktp. nur en kelkaj tagoj. Pro tio lia patro ofte fiere elmontris lian talenton antaŭ la vizitantoj. Ĉar li estis saĝa kaj aminda, la plenaĝuloj ankaŭ tre ŝatis ŝerci kun li. Ĉi tiu diris, "Kalkulo kio estas la horoskopa simbolo por dekjaraĝuloj!" kaj tiu diris, "Erhejêjo, petu por mi aŭguron!" Post la fuŝa prokrasto de grensemado kaŭzita de la aserto de Ĉuko II, "ne konvene por semi", li estis riproĉata de sia edzino kaj pliaĝa filo Tahej kaj primokata de la vilaĝanoj. Ankaŭ Erhejêjo estis multe primokata. Tiam li estis 13-jara kaj jam povis distingi kio estas bonintenca kaj kio estas mala. Tamen la plenaĝuloj ankoraŭ lin traktis kiel infanon. Kiam venis tiuj kiuj ŝatis ŝerci kun Ĉuko II, ili ofte demandis al li antaŭ la patro, "Erhej, aŭguro ĉu estas konvene por semi hodiaŭ?" Liaj samaĝuloj ankaŭ ofte kriis al li, "Ne konvene por semi, ne konvene por semi..." kiam ili malpaciĝis kun li. Pro tio, dum kelkaj monatoj li

evitis homojn ilin renkontante. Kaj fine konsiliĝinte kun sia patrino, li decidis ne plu sin rilatigi kun la aŭgurado de sia patro.

Erhejêjo amikiĝis kun Ĉinjo antaŭ du aŭ tri jaroj. Tiam li estis nur 16- aŭ 17-jara, kaj dum longaj vintraj noktoj li ofte sekvis la mallaborulojn por sin distri ĉe Feino III. Poste li intimiĝis kun Ĉinjo kaj ŝajne eĉ unu tagon ne povis pasigi sen vidi ŝin. Iu en la norda vilaĝo sin proponis svatisto por Erhejêjo kaj Ĉinjo. Sed Ĉuko II ne konsentis, ĉar unue, laŭ horoskopoj la sorto de Erhejêjo estas metala kaj tio de Ĉinjo, fajra kaj li timis ke fajro fandus metalon; due, Ĉinjo naskiĝis en la deka monato, kiu estas monato malbonaŭgura; kaj trie, la reputacio de Feino III estas malbona. Ĝuste tiam venis el Ĉangte, Honan-provinco, grupo da rifuĝantoj. Inter ili estis iu nomata Maljuna Li, kiu kunportis knabinon 8- aŭ 9-jaran. Por eviti malsaton li estis volonta fordoni sian knabinon al iu alia kiu volis ŝin akcepti. Ĉuko II konsideris tion bona negoco. Li demandis pri la naskiĝa dato kaj horo, longtempe fingrokalkulis kaj diris, "Gejunuloj mil liojn apartaj unu de la alia, destinitaj por geedziĝo, per unu sola fadeno kuniĝas." Kaj li akceptis ŝin por Erhejêjo kiel estontan edzinon.

Kiel ajn Ĉuko II asertis ke la knabino estos ideala edzino por Erhejêjo, tamen ĉi tiu ne konsentis. La patro kaj filo kverelis dum kelkaj tagoj. La patro persistis ŝin teni. La filo diris, "Ŝin tenu, se vi volas, sed mi neniam agnoskos ŝin mia fianĉino!" Fine, kvankam la knabino restis, tamen ne estis klare kia rilato estas inter ŝi kaj Erhejêjo.

6. Akuzaj Kunvenoj

De post Ĉinjo rifuzis lian amoron, Kin-vang nutris en si malamon kontraŭ ŝi kaj ĉiam esperis sin venĝi. Foje la Milica Komitato trejnigis vilaĝajn kadrojn, kaj Erhejêjo forestis pro malarieco. Post la trejnado, Kin-vang diris al Ŝing-vang, "Erhejêjo ŝajnigis sin malsana, ĉar li estas delogata de Ĉinjo. Ni aranĝu akuzan kunvenon kontraŭ li." Ŝing-vang estis ĉefkomitatano de la Milica Komitato. Ankaŭ lia amoro estis iam rifuzita de Ĉinjo. Kompreneble li aprobis la opinion de Kin-vang kaj konsilis lin diri al sia edzino ke ŝi mobilizu la Virinan Nacisavan Asocion por akuzi Ĉinjon. La edzino estis la prezidanto de la asocio. Ŝi ege malamis Ĉinjon, ĉar ŝia edzo ofte ĉi tiun vizitis. Nun Kin-vang petis ŝin persekuti Ĉinjon, tio ja estis bona okazo longe atendita. Ŝi tuj delasis sian laboron kaj iris aranĝi la kunvenon. La sekvintan tagon okazis du akuzaj kunvenoj, unu kunvokita de la Milica Komitato por akuzi Erhejêjon kaj la alia de la Virina Nacisava Asocio por akuzi Ĉinjon.

Estante senkulpa, certe Erhejêjo nenion konfesis kaj restis firma en memdefendo. Ŝing-vang ordonis ŝnurligi kaj sendi lin al la registaro por esti punata. Feliĉe la vilaĝestro estis klarcerba kaj li konsilis al Ŝing-vang, "Erhejêjo vere havis malarion; tio ne estis ŝajnigo. Rilate lian enamigon, tio ja ne estas afero kontraŭleĝa kaj oni ne devas lin ŝnurligi pro tio." "Li jam havas fianĉinon," diris Ŝing-vang. "Kiu en la vilaĝo ne scias ke Erhejêjo neniam konsentis geedziĝi kun tiu knabino akceptita por li de lia patro?" diris

la vilaĝestro. "Li ja havas la rajton rifuzi, ĉar knabo ne atinginte la aĝon 16jaran kaj knabino la aĝon 15jaran estas tro junaj por gefianĉiĝo. La knabino nur ĉirkaŭ dekjara, certe ankaŭ ne tion konsentos kiam ŝi plenkreskiĝos. Tial Erhejĉjo havas plenan rajton enamiĝi kun alia knabino kaj neniu povas interveni." Ŝing-vang povis trovi nenion por respondi, sed Erhejĉjo kontraŭakuzes lin demandis, "Ĉu ne estas kontraŭleĝe senkaŭze iun ŝnurligi?" Nur post malfacila klopodo, la vilaĝestro sukcesis ilin repacigi.

Ŝing-vang apenaŭ foriris de la Vilaĝa Administrejo, kiam venis Ĉinjo, trenante la prezidanton de la Virina Navisava Asocio. "Vilaĝestro!" ŝi kriis enirinte, "Kaptu rabiston kun rabajo kaj adultantojn je parkaŝo." Ĉu la fakto esti prezidanto de la Virina Nacisava Asocio donas al ŝi la rajton agi laŭplaĉe? Kiam Ŝing-vang vidis ke la edzino de Kin-vang estas entrenata, li rapide forŝteliĝis, ĉar li timis ke ŝi malkaŝus la tutan sekreton kiu lin implikis. La vilaĝestro demandis pri la kialo de la kverelo kaj post longa persvado ilin sukcesis pacigi.

7. Feino III Akceptas Svaton por Sia Filino

Post la du akuzaj kunvenoj, la enamiĝo inter Erhejĉjo kaj Ĉinjo ne povis plu esti kaŝata. Sciinte ke tio estas laŭleĝa, Erhejĉjo komencis publike konsiliĝi kun Ĉinjo.

Ĉagreniĝis Feino III. Kvankam ŝi estis patrino de Ĉinjo, tamen ili ne estis konkordaj dum la lastaj jaroj. Feino III amis junulojn, sed la junuloj amis Ĉinjon. En la okuloj de Feino III, la knabo estis kvazaŭ freŝa frukto, kaj tamen pro la ekzisto de sia filino ŝi ne povis ĝin ĝui. Jam longe ŝi volis trovi por Ĉinjo fianĉon kaj ŝin forsendi, sed pro ŝia malbona reputacio preskaŭ neniu volis parenĉiĝi kun ŝi. Post la akuzaj kunvenoj, oni diris ke Erhejĉjo intencis edziĝi al Ĉinjo memvole. Se tio vere okazos, ŝi pensis, eĉ ŝerci kun Erhejĉjo ŝi ne plu povos. Kia bedaŭrindaĵo! Tial ŝi multe klopodis por serĉi fianĉon por Ĉinjo.

"Kie flirtas varba flago, tien venas rekrutoj malgraŭ plago." Iu sinjoro Vu, eksbrigadestro sub la militaristo Jen Ŝi-ŝan, estis tre riĉa kaj jus perdis sian edzinon. Li iam vidis Ĉinjon ĉe foiro en vilaĝa templo kaj volis preni ŝin kiel sian duan edzinon. Svatistino tion sciigis al Feino III kaj certe ŝi volonte lin akceptis. Post nur kelkaj tagoj fianĉa donaco de sinjoro Vu estis akceptita. Feino III pensis ke la ĉagrena problemo estas solvita. Ĉinjo pensis ke ŝi jam plene interkonsiliĝis kaj preskaŭ ĉion decidis kun Erhejĉjo. Kiel ŝi povus ankoraŭ aŭskulti al sia patrino? Tiun tagon kiam sinjoro Vu alsendis sian fianĉan donacon, Ĉinjo havis kvereleĝon kun sia patrino kaj disjetis sur la tutan plankon la harornaĵojn kaj silkaĵojn senditajn de sinjoro Vu. Post la foriro de la svatistino, Ĉinjo diris al sia patrino, "Mi havas nenian rilaton kun ĉi tiu afero! Kiu akceptis lian donacon, tiu edziniĝu al li!"

Feino III ĉagreniĝis kaj dormis duontagon. Post la vespermanĝo, ŝi anoncis ke enkorpiĝis en ŝin la feino kaj oscedinte dufoje ŝi ekkantis. Unue ŝi riproĉis Ju Fu, pro lia senkapableco en hejma disciplinado. Poste ŝi diris ke Ĉinjo kaj

sinjoro Vu estas destinitaj en la lasta vivo por esti geedzoj, kaj ŝi kantis. "Geedziĝon destinis la sorto, malobeon ja punos la morto..." Ju Fu petis indulgon surgenue, sed la feino ordonis lin nepre tuj bati Ĉinjon. Vidinte ke ŝi ne povus rezoni kun tia sorĉistina patrino, Ĉinjo foriris lasante sian patrinon babilaĉi al si mem.

Ĉinjo ŝtele iris al la suda vilaĝo por serĉi Erhejĉjon kaj lin renkontis neatendite survoje. Li venis ankaŭ por ŝin serĉi. Ili iris man-en-mane en grandan kavernon por interkonsiliĝi kiel trakti kun Feino III.

(daŭrigota)

Trad. Honfan

* Pri la aŭtoro vidu p. 7, N-ro 1, Vol. I.

** "Ĉuko" estas la familia nomo de Ĉuko Liang (181—234 p.K.), eminenta politikisto en la Tri-Regna epoko. En la romano "La Tri Regno" li estas priskribita kiel homo kun superhoma kapablo, kiu povas venigi venton kaj pluvon kaj diveni per aŭguro. Tial aŭguristoj ofte sin nomis per lia nomo, kiel Ĉuko II.

† Embrio de la ĉinaj ideografoj. Ili estas ok signoj reprezentantaj naturajn fenomenojn. Superstiĉuloj ilin rigardis sanktaj kaj uzis ilin en aŭgurado.

‡ T.e. profunden en la teron je la larĝeco de kvar fingroj.

§ Ĉiuj ĉi tiuj estas terminoj uzataj en la ĉina superstiĉa arto. Antaŭe la 12 teraj ciferoj estis ankaŭ uzataj por nomi la horojn, la monatojn ktp, kaj kombinitaj kun la 10 ĉielaj ciferoj ili formas 60 ciferojn por kalkuli la tagojn, jarojn ktp. La kvin elementoj estas metalo, ligno, akvo, fajro kaj tero. Ilia rilato pozitiva estas: metalo estigas akvon, akvo lignon, ligno fajron, fajro teron kaj tero metalon. Ilia rilato negativa estas: metalo konkeras lignon, ligno teron, tero akvon, akvo fajron kaj fajro metalon. La 64 aŭguraj formuloj estas kombinitaj el la ok sanktaj signoj.



Ĉinjo kaj Erhejĉjo iris man-en-mane en grandan kavernon por interkonsiliĝi kiel trakti kun feino III.



Kanto de Ĥazakoj

Ĉi Ĉen-sia

Ventego blovas,
Neĝflokaj giras 1).
Portante la donacojn al PLA-batalantoj
68-jara oĉjo Huganija sub neĝstormo iras.
Lian ŝafpelton mordpenetras frostoj,
Sed fajro kvazaŭ brulas en la brusto.
Leviĝas lia kapo.
Kies la knabino
Kaj la knabo
Kiu kantas surĉevale?
"Tienŝan estas pli alta ol ĉielo 2),
Kaj supre neĝo falas en pelmelo 3).
Sed la PLA-batalantoj ĉion spite
Faligis Usman, nian plagon 4).
De la montvalo ĝis la stepo
Ĥazakoj vidas fine sunan tagon!

Parolas ĉiam kun ridet' la kamaradoj,
Tute afablaj kiel niaj fratoj,
Manpremis kun mi bonhumore,
Lernigis al ni kanti ĥore,
Brullignojn hakis por ĉi tiu homo,
Aŭ akvon portis por alia domo.

La pinoj sur Tienŝan kreskadas multebrake,
Dum nia vivo feliĉiĝas ĉiutage.
Ĉion ni ŝuldas al la Kompartio
Kaj Prezidanto Maŭ, nia savanto.
Ho, Prezidanto Maŭ!
Ĥazakoj vin memoros ĉiam kun laŭdkanto.

La neĝo sur Tienŝan restados tra mil jaroj,
Ankaŭ ne forgesiĝos viaj bonaj faroj!"

Oĉjo Huganija
Spronas la ĉevalon per la vipo.
Estas juna Osman de la nigra tendo
Kaj Marinjo el la antaŭmonta tribo.
"Oĉjo Huganija,
De la montar' revenas nun la PLA-taĉmento,
Ĝi pasis tra Heŝanĉa kvardek li-ojn je la oriento,
Ĉu scias vi?"
"Certe plimulte ol vi ni aĝuloj scias.
Rigardu, kio estas ja sur la kamelo?
Du ŝafoj.
Tiujn grasulojn paŝtis mi persone,
Kiel donacon al PLA mi nun donas.
La kamaradojn ili nutros bone."

Marinjo,
Kies maldikaj brovoj movetiĝas,
Ĉe l' ŝultroj harplektaĵoj pendolas.
La florumitan ĉapon iom ĝustigante,
Kun rideto ekparolas:

"Kiel diras la proverbo:

'Kiu centdoman veston portas, ĝuos longan
vivon 5)'.

Rigardu tiujn ovojn en la granda korbo,
Jen la 'mangaĵo el cent domoj'. 6)
Ĝi donos al PLA-homoj ĝoj-motivon!
Jen pureblanka lakto en boteloj,
La 'lakto el mil domoj'. 6)
Ĝi forgesiĝos la PLA-homojn pri ĉiuj suferoj.
Manginte la mangaĵon el cent domoj,
Trinkinte lakton el mil domoj,
Longe longe vivos la PLA-homoj."

Nun sekvas juna Osman:

"Mia donaco estas la plej bona,
Ĝi estas ruĝa ĉevalo.

Rajdante sur ĝi la PLA-homo
Flugos tra step' kaj valo
Ĉasante post fuĝanta banditaro.
Kiam ekstermos PLA la fiamason,
Ni ĝuos jam eternan pacon!"

.....
Ĉesas nun la neĝstormo,
Bluas la firmamento,
Sur kresto Tienŝan-a neĝkrono brilas je arĝento.
Jen ruĝa flago flirtas en la vento,
Alvenas tie nia PLA-taĉmento.

Tradukis S. J. Zee

1. *Giri: ronde turniĝi (poezia vorto).*
2. *Tienŝan: granda montaro en Sinkiang-Provinco. La nomo signifas en ĉina lingvo "ĉiela monto."*
3. *Pelmelo: mikskonfuzo.*
4. *Usman estis veterana bandito kaj dungita spiono de la Usona imperiismo kaj Ĉiang Kaj-ŝek. Li premegis la popolamason dum pli ol dudek jaroj. —Rimarko de la verkinto.*
5. *Ekzistas superstiĉo inter la popolamaso. Oni petas de najbaroj kaj konatoj po unu peceton da tolo kaj kunkudras ilin en diverskoloran veston por sia infano. Ĝi defendas la infanon kontraŭ malsanoj kaj antaŭtempa morto. Tiu veston oni nomas centdoma vesto. Tiu superstiĉo ankaŭ ekzistas inter Han-nacio.*
6. *La vojo estas longa. Oni kolektas la donacojn de la tuta tribo kaj komisiis iun personon por porti ĉion kune al la difinita trupo. Tio estas nomata centdoma donaco. —Rimarko de la verkinto.*

**NI BATALAS POR
NOVDEMOKRATIO
KAJ MONDPACO**

—letero de ULSP al laborista
grupo de Turku, Finnlando—

Karaj gekamaradoj,

Ricevinte vian leteron ni sentas grandan ĝojon, ĉar la laboristaroj de ambaŭ niaj landoj estas ĉiam amikaj. La ĉina laboristaro atente observas la bataladon de la finnlanda laboristaro por demokratio kaj libereco kaj por la defendo de la mondpaco.

Nun ni iom rakontu al vi pri la laboro, vivo kaj lernado de la Pekinaj laboristoj. Ni esperas ke tio interesos vin.

En la tempo de pli ol du jaroj post la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko, ni Pekinaj laboristoj kaj la laboristaro de la tuta Ĉinio vere fariĝis la mastro de la lando sub la gvido de la Ĉina Komunista Partio kaj Prezidanto Maŭ Ze-tung, la prudenta gvidanto de la ĉina popolo. Sep laboristaj reprezentantoj estis elektitaj kiel anoj de la Komitato de la Pekina Popola Registaro. En niaj fabrikoj kaj entreprenoj estas praktikata demokrata administrado kun partopreno de sindikataj reprezentantoj. Nia ekonomia vivo estas garantiata: suferoj de malsato kaj frosto, senlaboreco kaj vagado por eterne forpasis. La Popola Registaro publikis sindikatan leĝon kiu protektas nian rajton de organizado de laboristaj sindikatoj. Ni ĝuas laborasekuron: la ŝtato solvas por ni la malfacilojn pro infannasko, maljuneco, malsaniĝo, vundiĝo, kripliĝo kaj morto. Ni laboristoj de Pekino havas niajn proprajn kulturajn palacon kaj teatron, kaj ĝenerale ni havas ankaŭ klubojn, kuracejojn kaj banĉambrojn en niaj fabrikoj. Post la laborhoroj ni povas laŭvole lerni kulturon kaj teknikon en senpagaj lernejoj. Ni vere stariĝis!

En la tempo de pli ol du jaroj, kiel mastro de la lando ni ĝoje laboras sur diversaj produktaj postenoj disvolvante la laborentuziasmon kaj saĝecon de nia laborista klaso kaj kreante por la lando gigantan riĉon. En la granda movado kontraŭbatali Usonon kaj helpi Koreion ni diligente laboras por subteni la fronton sub la devizo "Fabriko estas nia batalkampoj, maŝino estas nia armilo." Ni ĉiuj laboristoj subskribis por ke la kvin potencoj kontraktu pacpakton. 98% el la laboristaro de Pekino kontraktis patriotan pakton. Ni aktive

respondis la alvokon de la Ĉina Popola Land-Komitato por Rezisti Usonon kaj Helpi Koreion pri kontribuo de aeroplanoj, tankoj kaj kanonoj por subteni la Ĉinajn Popolajn Volontulojn kaj la Korean Popolan Armeon. Per plimultigo de produktado, ne influante nian vivnivelon, ni laboristoj de Pekino donacis sumon sufiĉan por aĉeti 69 batalaeroplanojn. Nun ni ankaŭ sekvas la alvokon de Prezidanto Maŭ Ze-tung kaj la Tria Sesio de la Politika Konsiliĝa Konferenco de la Ĉina Popolo pri disvastigo de la patriota movado de ŝparo kaj pli-



produkto, por plie subteni la ĉinajn popolajn volontulojn kaj pretigi fundamenton por grandskala industria konstruado de nia lando.

En la tempo de pli ol du jaroj ni profunde komprenis ke sub la gvido de la Ĉina Komunista Partio kaj nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ Ze-tung, la forto de la ĉina laborista klaso estas senkompare granda kaj neelĉerpebla, kaj nia patrolando estas belega kaj aminda. Ni diligente laboras, kaj ni konscias ke ni laboras por konstrui novdemokratian Ĉinion, por krei socialisman estontecon en Ĉinio, por frakasi la agresan ambicion de la Usona Imperiismo, kaj por defendi la pacon en Azio kaj en la tuta mondo!

Fine, ni deziras al vi pli grandan sukceson en via estonta batalado por popola demokratio kaj daŭra paco! Vivu nia nerompebla amikeco!

Unio de Laboristaj
Sindikatoj de Pekino

**La Suferoj Jam Estas For,
kaj Ne Plu Revenos**

Karaj Gesamideanoj,

Ĉiam pli kaj pli evidentiĝas ke Esperanto estos la lingva ligilo inter la popoloj en la estonta socialista mondo, samkiel la aviadilo kaj helikoptero estos la ĉefaj mekanikaj ligiloj inter la homoj de tiu feliĉa

mondo—mondo sen milito kaj sen krueleco.

Legante la lastajn numerojn de "El Popola Ĉinio" pri la gravaj konstrulaboroj en via granda lando oni vidas klare, ke la granda, bona laborema sed bedaŭrinde ĝis nun tiom malfeliĉa, ĉina popolo fine trovis la ĝustan vojon al sia estonteco. Dum multaj jarcentoj la ĉina popolo laboregadis—unue por siaj enlandaj ekspluatantoj kaj poste ankaŭ por la alilandaj imperiistaj sangosuĉantoj—kaj mem mortsuferis pro malsato kaj malhavo. Sed nun ni nepre kredas ke via popolo, same kiel ĉiuj liberigitaj de imperiista dependeco demokratiaj popoloj, paŝas senhalte kaj certe, sub la saĝa gvidado de la komunista partio al pli bona, pli riĉa kaj pli feliĉa vivo.

La koroj de ĉiuj progresemaj homoj en la mondo ĝojsaltas je tiuj agrablaj novaĵoj.

La pasinto jam estas for, kaj ne plu revenos.

Paŝu antaŭen, karaj kamaradoj, al sekureco, prospero kaj feliĉo; al inda homa ekzistado kaj al vera frateco inter la popoloj!

Vivu la Ĉina Popola Demokratio!

Nun, finante mian leteron, mi bondeziras al vi je la nomo de niaj kamaradoj ĉitieaj kaj de ĉiuj instruistoj kaj gelernantoj: Feliĉan progresadon al la bona estonto de la ĉina popolo!

Kore via
Gregor G. Choutoff
Izraelo

Vasta Arbaro-Plantado

(daŭrigo de p. 10)

forta subteno de la popolo, povas fari multe. Oni jam vidis subjugita la Huaj-Riveron, kiu ĉiam superakvigis vastajn areojn de la lando kaj senhejmigis milionojn da homoj. La popolo alte taksas la aldonitajn benojn kiujn alportis la riĉaj rikoltoj en tiuj ĉi antaŭe ruinigitaj regionoj. Por plua kontrolo de naturo, la Ministerio de Forstokulturo estas laboranta pri 30-jara plano forstigi duonon de la lando konvenan por arbaro-produkto en Ĉinio. Tiu ĉi areo estas 11 fojojn pli granda ol la Britaj Insuloj.

La ĉina popolo havas plenan konfidon en transformo de la naturo same kiel en la transformo de la politika kaj ekonomia strukturo de la ŝtato, kion ĝi jam realigis per la revolucio.

Trad. W. S. Ho

Kunlaboru Tutmondaj Esperantistoj!

Traduko, represio, resumo kaj ĉiumanieraj utiligoj de materialoj en nia bulteno estas permesataj kaj dezirataj kondiĉe ke ili ne estos malice kripligataj kaj la utiliginto plenumos niajn jenajn petojn:

1) Post la traduko, represio, resumo aŭ aliaj utiligoj rimarki aparte el kiu numero de nia bulteno ĝi estas tradukita ktp.

2) *Sendi al ni 4 ekzemplerojn* de la traduko, represio aŭ resumo kaj sur ili noti el kiu numero kaj kiu artikolo ĝi estas tradukita ktp.

3) Sciigi al ni kia estas la *jurnalo aŭ gazeto*, sur kiu aperis la traduko, represio, aŭ resumo kaj, se eble, kiom da legantoj ĝi posedas.

Se iu el vi, karaj samideanoj, interesigas pri popola Ĉinio, bone utiligas niajn materialojn kaj volas pli multe informiĝi, sciigu al ni vian bezonon kaj ni volonte vin provizos laŭeble.

"Plej bona propagando estas praktiko". Estas jam tempo por antaŭenpuŝi nian movadon al pli alta stadio ol nur propagandi. Kunlaboru, ĉiuj esperantistoj tra la tuta mondo!

La Red.

ENHAVO

Bildo sur la kovrilo—Danco kun
Silka Rubando

Al Nova Venko

La Usonaj Mortigistoj

Granda Amo

Ĉina Laboristaro en la Kampanjo
Kontraŭbatali Usonon kaj Helpi
Koreion

La Saloekstraktejo de Huajpej
Sukcesoj de Sanitara Laboro en
Ĉinaj Fabrikoj kaj Minejoj
Ĉinio Efektivigas Vastan Arbar-
planon

Nova Ĉinio en Bildoj—La Aŭto-
noma Regiono de Interna
Mongolio

Diabloj Ŝanĝitaj en Homojn

Kanto de Ĥazakoj

Edziĝo de Erhejĝo

PAGU AL NIAJ PERANTOJ

Aŭstralio: Steve Bennett, Flat 3, 62 Brighton Av., Croydon Park,
N. S. W. (Jarabono 7s. 6p.)

Aŭstrio: Antonio Balague, St.-Pölten, Kirchenweg 12.
(Jarabono 20 schilling-oj)

Belgio: Walraevens Rajmundo, Rabelais Strato, 10, Bruselo.
(Poŝtĉekkonto: 16, 43, 53) (Jarabono: 50 bfr.)

Britlando: (1) F-ino F. Paraige, 10 Woronzow Road, St. John's
Wood, London, N. W. 8. (Jarabono 6 ang. ŝil.)
(2) **Universala Esperanto-Asocio**, Heronsgate, Rick-
mansworth, (Herts.).
(3) **Collet's Subscription Department**, 40 Great Russell
Street, London, W. C. 1.

Bulgario: (1) **Bulgara Esperantista Kooperativo**, Sofia—Str. TRI
UŜI, 15. (Jarabono 200 Lv.)
(2) **Ivan Kovaĉev**, Sofia, str. "Iv. Bigor" no. 24.

Ĉeĥoslovakio: (1) **Burda Rudolf**, Plzen-palackeho N. ĉ. 6,
(Jarabono 50 kĉs.)
(2) **Slovaka Esperanto-Instituto**, T. S. Martin,
Kuzmany-str. 29. ĈSR-Slovakio.

Danlando: Borge Astrup, Ymersvej 32, Randers.
(Jarabono 6 kronoj)

Finnlando: Niilo Kavenius, Niklaksenkatu 10/14, Turku 9.
(Jarabono: 300 Fmk.)

Francio: **Labor-Esperantista Federacio**, 34, Str. Chabrol—PARIS
—Xe. (CCP. Paris 902-52) (Jarabono: Fr. Fr. 450)

Germanio: Arthur Schulze, Berlin-Lübars, Kolonie, Waldes-
frieden 77. (Jarabono: 6 D.M.)

Hungario: (1) **KULTURA**, Budapest, V. Akademia u. 10.
(Jarabono 15 forintoj)
(2) **Marton Lajos**, Bors.-u. 2, Budapest, XII,
(poŝtkonto 38.187)

Islando: Siguldur Gudmundsson, Falkagata 1, Reykjavik.
(Jarabono 15 kronoj)

Italio: Itala Laborista Esperanto-Asocio, Via Modena 33—Torino.
(Jarabono: 400 liroj)

Izraelio: Bencion H. Danon, Kibuc Afikim. (Jarabono: 400 prutoj)

Japanio: (jarabono 360 jen-oj)

Nederlando: (1) **Heroldo de Esperanto**, Harstenhoekweg 223,
Scheveningen. (Jarabono fl. 3.50)
(2) **Esperanto-Grupo Vaals**, Pr. Bernhard-str. 4, Vaals.

Pollando: **Asocio de Esperantistoj en Pollando**, Warszawa Marszal-
kowska 81/32. (Poŝtĉeka konto I-4329)
(Jarabono 12 zl.)

Rumanio: **Rumana Esperantista Societo**, București I, Bulev. 6
Martie 15, et. I. (Jarabono: 120 leoj)

Svedio: Einar Adamson, Värmlandsgatan 18, Göteborg.
(Jarabono 5 kronoj)

Usono: (jarabono \$1.25)

Rim: Legantoj en aliaj landoj povas pagi per respond-kuponoj
(1 rk. kontraŭ 1 ekz.) aŭ egalvaloraj Esp-aj libroj (sed ne gazetoj).
Senpagan specimenon ni sendos al ĉiu kiu letere postulos.